revuo

esperanto

januaro 1966
59-a jaro
n-ro 722 (1)

universala esperanto - asocio (e[illegible] konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

1 Sur la sojlo de la nova jaro (Lapenna)

2 La originala Esperanta literaturo 1955-1965 (Auld)

7 La subskribo-kolektado daŭros en 1966!

8 Praktika aboco de UEA por novaj membroj

9 Recenzoj

10 Kongreslandaj scenoj

12 Recenzoj
Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologoj Pfeffer, Tressel, Fahner
En la grupoj

13 Mallongaj novaĵoj

14 La Juna Vivo

15 Kiel ricevi vizon por viziti Hungarujon
UK 1967 decidita: Tel Aviv

16 Akademio de Esperanto
Belartaj konkursoj 1965: foto-konkurso
Lerneja konferenco en Graz
Oficiala informilo n-ro 386

18 Esperanto en radio

19 Anoncetoj
Internaciaj Konkursoj 1965

kovrila bildo La Elizabeta Ponto, Budapest. Fotis: Jurica tibor

bildojn liveris

10 (Dekstre malsupre:) Bajkor józsef
(Dekstre meze:) Gere lászló

11 (Dekstre supre:) Vadas M T I
(Dekstre malsupre:) Kováts lászló

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
januaro 1966

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Girkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

Bankisto de U.E.A.:
Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1966): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.
Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:
Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

SUR LA SOJLO DE LA NOVA JARO

La transiro de unu jaro al alia certe per si mem ne prezentas gravan eventon. Tamen, bezonante ekspiron en la senspira vivkurado, ni ĉiuj elektis ĝuste tiun okazon por artefarita momenta halto, dum kiu niaj pensoj sin turnas retrospektive por imagi pli vivece la perspektivojn.

Eĉ nura supraĵa rigardoĵeto al la klopodoj, agadoj kaj realigoj de la Esperanto-Movado en la pasintaj dek du monatoj tuj facile malkovras multajn objektivajn sukcesojn kaj pluajn progresojn, sed ankaŭ neantaŭvideblajn malfacilaĵojn kaj superfluajn mankojn. En la amaso da faktoj, moviĝoj kaj tendencoj, kiuj viciĝas antaŭ niaj okuloj, ni rimarkas, ke ofte interplektiĝis ĝenerale realeca taksado de la eblecoj kaj idealisma sindediĉo por maksimume ekspluati ilin, unuflanke, kun sporadaj fenomenoj de plena neglektado de ŝancoj, pura tempoperdo por fantaziaĵoj, apatio aŭ, en kelkaj kazoj, eĉ rekta defetismo, aliflanke. Tamen, en la ĝenerala bilanco de la laboro efektivigita en 1965, la aktivo certe multe superas la pasivon kaj en la fina analizo elstaras tuta aro da sendube pozitivaj rezultoj, el kiuj kelkaj aparte reliefiĝas.

Kongresoj montras dinamismon

La jaron 1965 unuavice markas, apud la daŭrigo aŭ vastigo de la kutimaj agadoj de UEA konforme al la Dua Laborplano (1962), la nombra kresko, la pli forte akcentita universaleco kaj la konsiderinda kvalita altiĝo de niaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj. La Universala Kongreso, okazinta por la unua fojo en Azio, superis ĉiujn, eĉ la plej optimismajn atendojn pro siaj altnivelaj kulturaj manifestacioj kaj perfekta organizo. La Nordlanda Kongreso en Oslo, la Eŭropa Konferenco en Vieno, la Kongreso de TEJO en Otsu, la amasa Junulara Festivalo en Dimitrovgrad kun partopreno de 1.150 gejunuloj, la Fervojista Kongreso en Hamar, la bonega seminario de TEJO en Podvin, kaj nombro da aliaj internaciaj renkontiĝoj aŭ landaj kongresoj kun partopreno de eksterlandanoj klare indikas la plian internaciiĝon kaj el vidpunkto de la persona konsisto kaj el tiu de la geografia etendiĝo de la kongresaj centroj.

Tiom da internaciaj kunvenoj en tiom da lokoj dum la tuta 1965, ekde la brila Seminario de GEJ en Nürnberg ĝis la seminario de la sama GEJ fine de decembro en Hamburg, estas per si mem rimarkinda fakto, kiu montras la dinamismon de la Movado. Ĝia graveco elsaltas, se oni prenas en konsideron la ĝenerale bonan kvaliton de la aranĝoj, ilian grandan valoron por diskonigo de la lingvo kaj por ĝia plua disvastigo en la respektivaj regionoj kaj la fortikigon de la internaciaj ligoj.

La lasta elemento jam apartenas al unu el la multaj efektivigoj de la granda kampanjo okaze de la jaro de Internacia Kunlaboro. Kvankam la precizaj rezultoj estos konataj nur komence de 1966, post la ricevo de ĉiuj raportoj de la landaj asocioj, jam nun estas evidente, ke la plano estas preskaŭ komplete plenumita kaj la ĉefaj celoj atingitaj.

La atingoj de 1965 estas instruaj por nia laboro en 1966. Ili vidigas, kiujn aspektojn necesas plue atente flegi, kiujn malfortajn flankojn fortikigi kaj kiujn mankojn forigi, se ni deziras progresi pli rapide kaj pli firme en la sekvanta jaro.

JIK-laboroj ankaŭ en 1966

La unuan lokon en nia laboro devos okupi la daŭrigo de la agado laŭ la Laborplano por la JIK. La Estraro de UEA jus unuanime decidis akcepti la proponon de Unesko, ke la agadoj de la neregistaraj organizaĵoj, planitaj por 1965, etendiĝu al 1966 en ligo kun la 20-jara datreveno de la fondiĝo de Unesko. Tio signifas, ke ĉiuj organizaĵoj kaj la tuta membraro apartenantaj al UEA daŭrigos en 1966 la laboron laŭ la sama plano, inkluzive la kolektadon de subskriboj je la propono prezentota al UN. La sola diferenco estos, ke en 1966 la emfazo estos sur la laboro de Unesko. La landaj kaj fakaj organizaĵoj jam ricevis konsilojn rilate la daŭrigon de la agado. En ĝi ĉiu unuopa esperantisto — unuavice tiuj, kiuj ne estis aktivaj en 1965 — povos multe helpi precipe en la kolektado de individuaj kaj kolektivaj subskriboj je la propono al UN.

Alia grava tasko estos la fortikigo de la ekzistantaj lokaj grupoj kaj kreo de novaj. En la Dua Parto de la Jarlibro 1965 aperas listo kun adresoj de ĉiuj lokaj grupoj surbaze de enketo farita de CED. La artikolserio pri la lokaj grupoj, aperinta en 1965, estos baldaŭ publikigita en formo de broŝuro. La materialoj en la du publikaĵoj sendube helpos al plibonigo de la laboro de niaj bazaj organizaĵoj.

Unu el niaj plej ĝenaj mankoj estas la ofta foresto de interna disciplino. Ĝi manifestiĝas en multaj formoj, el kiuj aparte malhelpaj estas la neobservado aŭ malatentado de la faritaj decidoj kaj akceptitaj sindevigoj. Ni estas sufiĉe multnombraj por efektivigi, etapon post etapo, la grandiozan celon de komuna neŭtrala lingvo por la internaciaj rilatoj, sed ni estas senpovaj, se ni disrompas la fortojn anstataŭ agi unuece por atingi konkretajn, klare difinitajn celojn. Multe pli da interna disciplino estas nepra antaŭkondiĉo por fakte rimarkinda progresado ne nur en 1966, sed ankaŭ en la postaj jaroj.

La suprajn vortojn mi direktas ne al la esperantistaro, abstrakte kaj senpersone, sed al ĉiu unuopa esperantisto kaj esperantistino, tute egale ĉu li aŭ ŝi estas membro de UEA aŭ ne. Samtempe mi deziras al ĉiuj plej feliĉan kaj prosperan Novan Jaron.

Prof. d-ro Ivo Lapenna

LA ORIGINALA ESPERANTA LITERATURO 1955-65

William Auld

Kiel prijuĝi la originalan literaturon en Esperanto? Sur kiuj kampoj ĝi estas plej forta? Kiuj aŭtoroj elstaras en la perspektivo de la pasinta jardeko? En ĉi tiu tre kompleta superrigardo la aŭtoro de "La infana raso", iama redaktoro de "Esperanto" kaj "Monda Kulturo" kaj kompilinto de la "Esperanta Antologio' donas proprajn respondojn al tiuj kaj aliaj demandoj pri tiu grava periodo.

Ĉu juĝi laŭkvante ?

Ĵetante rigardon tra la pasintaj dek jaroj sur kampo de nia originala literaturo, mi ne povas ne miri pri la pesimisma sinteno de iuj kritikintoj rilate al ĝi: mi ekdemandas min, ĉu efektive tiuj amikoj legis diligente kaj amplekse tiun literaturon, kiun ili diras malŝati? Ĉu ili juĝas sole laŭkvante (apenaŭ cent libroj dum dek jaroj), kvankam ili pretendas juĝi laŭkvalite? Eble necesas al ili miloj kaj miloj da novaj verkoj, antaŭ ol rekoni, ke unu-du el ili atingas nivelon indan je ilia atento? Miloj kaj miloj da verkoj aperas ĉiujare en angla lingvo, sed, pro dio, la plimulto (da beletraj verkoj) havas nulan literaturan valoron. Ĉiujare en originala Esperanto deko da libroj: pri ilia kvalito mi volas konsideri kelkajn faktojn.

El kvar romanoj: unu majstroverko

Unue, estas fakto, ke la esperanta literaturo diferencas, kiel tuto, de la naciaj literaturoj nuntempaj. Aperas proporcie multege da poezio (meznombre tri volumoj ĉiujare), sed nur kvar romanoj dum dek jaroj (tamen ĉiujare unu novelaro). Sed tio en si mem ne konsistigas validan kritikon *pri tiuj verkoj, kiuj aperis;* estas dubinde, ĉu ĝi konsistigas kritikon pri la esperanta literaturo — mi ne scias, kial la internacia literaturo devus sklave sekvi la unuopajn naciajn literaturojn. Ĉu ĝia rolo ne estas esence malsama? Povas esti, ke kun la tempo ĝiaj konturoj ŝanĝiĝos, sed dume ŝajnas al mi tre naive, riproĉi al nia literaturo tion, kio mankas al ĝi (senkonsidere pri la kaŭzoj de tio), samtempe ignorante, aŭ subtaksante, tion, kion ĝi havas. Nur kvar romanoj: — sed unu el ili, *Vojaĝo al Kazohinio,* estas majstroverko, alia — *Kiel akvo de l' rivero* — estas multe pli bona ol la meza nuntempa angla romano, kaj la aliaj du, *Mistero minora* kaj la dua eldono de *Homoj sur la tero,* estus legataj, sed eble ne tre alte taksataj, ankaŭ en nacilingvo. Kaj tiu prijuĝo tute ignoras unu plej gravan ingrediencon de la menciitaj verkoj: ilian lingvaĵon. Lingve kaj stilistike, la tri laste menciitaj verkoj estas multe pli viglaj kaj maturaj ol la meza nacilingva romano:

Ankaŭ tiu ĉi tago ne promesis multajn emociojn. Senfrote, laŭprograme, ĝi enviciĝos en la ebenan serion de ĉiuj aliaj fruaŭtunaj tagoj. Laŭ kapricoj de l' ventoj, velkintaj folioj, falinte de aleaj arboj en la najbaraĵo, ankaŭ hodiaŭ balae glitos tra l' kvartalo . . .

Maloftaj estas en nacilingvo romanoj, kies plej banalaj konceptoj esprimiĝas kun tia atentokapta zorgo pri ĉiu vorto kaj ĉiu frazo, kia karakterizas tiujn niajn romanojn. Ĝuste tio unuavice valorigas ĉi-lastajn; sed konsentite, ke por gustumi tion oni bezonas senteman palaton kaj amon por Esperanto egalan al sia amo por la propra nacilingvo. Kiu malhavas tiujn tamen apenaŭ estas ekipita por fariĝi recenzanto de la esperanta literaturo.

Due, estas fakto, ke en nacilingvoj la poezio nuntempe ne estas furora legaĵo. Tio tamen al neniu rajtigas aserti, ke la poezio de Esperanto estas senvalora, superflua aŭ amatora, aŭ tute ignori ĝian ekziston, kiam oni taksas la literaturon esperantan. Ĉar tria senduba fakto estas tio, ke personoj, kiuj deziras minimumigi aŭ ridindigi Esperanton, havas la agrablan kutimon aserti interalie, ke kompreneble Esperanto ne taŭgas por la poezio, ĉar la poezio esprimas la plej noblajn aspirojn kaj la plej sanktajn tradiciojn de la homaro, ktp. Videble, kvankam oni ne legas la poezion, oni ankoraŭ rekonas ĝian prestiĝon kiel la plej altan etapon de la belliteraturo. Kaj se mankas al ni populara kaj facila legaĵo, tamen la plej alta etapo ĉe ni estas fortega. Mi ne deziras, ke tiu ĉi artikolo fariĝu nura katalogo, sed kiam temas pri pli ol tridek titoloj, kion fari? En la pejzaĝo de nia poezio oni rimarkas tuj la ulmojn, kaj el ili abundan foliaron disetendas Marjorie Boulton, kies unua poemaro *Kontralte* efektive malfermas nian periodon; tiun epokfaran volumon sekvis *Cent ĝojkantoj* (1957) kaj atutis *Eroj* (1959). Ŝia gamo estas tre vasta. Tre frapa unuavide estis ŝia konsterna honesteco pri la propra psiĥo:

> *Sed mi pro vi neniam ekfeliĉas —*
> *Amato la unua* — mia patro!

En pasiaj, turmentoplenaj versoj ŝi nudigis sian animon kaj verŝis en la poezion tiujn premajn emociojn, kiujn la ĉiutago devigis ŝin dolore forkaŝi. Malofta estas la senkompromisa

rektesprimo eĉ en poezio, precipe kiam temas pri tiel subjektiva poezio; eĉ pli maloftaj estas la poetinoj, kies voĉo penetras ĝis la plej kerna mieco de la leganto. En angla lingvo nur Emily Dickinson atingas por mi similan nivelon de konsterna trafo; en Esperanto oni trovas ĝin — pli varman, pli barokan — kelkfoje ankaŭ ĉe Eli Urbanová (*Nur tri kolorojn*, 1960):

En sonĝo nur
ni niajn korpojn tuŝas
tremante pro volupt' ...

Socie konscienca poeto

Sed tiu elstara karakterizo en la poezio de Marjorie Boulton ne estas ŝia sola. Ŝi estas krome sentema observanto de la naturo, kapabla kristaligi por ni momentfotojn, kiuj prilumas fenomenojn banale akceptatajn de malpli respondemaj konsciecoj:

Trankvilaj arbprofiloj.
Subita flugo migra.
Dekoj da sturnoj
El poplo. Turnoj.
Arbo ekflamis. Torĉo nigra,
Flagro de flugiloj.

Kaj, certe ne malplej grave, ŝi estas socie konscienca poeto, kiu ne ŝparas sian indignon kaj sian ironion kontraŭ maljustaĵoj, malraciaĵoj kaj kruelaĵoj de la monda vivo.

Nia periodo vidis ankaŭ unu pluan volumon de Baghy kiu, se li mem estas plej majesta ulmo sulketa pro jaroj, aldonas pomarbon al nia pejzaĝo: *Sonĝe sub pomarbo* (1958), ligiĝantan al la edena pomarbo, al la junuleco kaj la juneco. Ankoraŭ hodiaŭ, sepdekkvarjara, Baghy verkas tiel freŝe, suke optimisme kiel antaŭ preskaŭ duonjarcento: lia talento estis ĉiam vortigi la ideologiajn sentojn de la esperantistaro, kaj se nia movado jam ne bezonas tiajn sentojn — kion mi ne kredas — ĝi terure malriĉiĝis kaj ekvelkis. Baghy ne lasas sin kompari kun nacilingvaj aŭtoroj: li estas plej indiĝene esperanta; por aprezi lin oni devas esti tutkora esperantisto, kaj mi ne scias pli altan laŭdon por originala esperanta verkisto. En 1960 aperis ankaŭ nova novelaro lia, *Koloroj*, kiu, kiel lia drampoemo, spegulas la trajtojn de la bagieco.

Inter niaj poetoj prezentiĝas krome kvar nomoj elstaraj: Ragnarsson (*Ŝtupoj sen nomo*, 1959); de Kock (*Ombroj de la kvara dimensio*, 1961); Maura (*Duonvoĉe*, 2a eld., 1963); Tárkony (*Soifo*, 1964). Du junaj avangardanoj kaj du veteranoj, inter 65 gradoj de norda latitudo kaj 30 gradoj de suda; oni ne povas diri, ke ili estas tre similaj inter si, sed ju pli similaj estas poetoj, des malpli potencaj. Tamen okazis kelka interkontakto kaj interinfluo; eĉ de Kock, la plej tradicirompema el ili, foje konfesis sian admiron pri la verkoj ĝuste de Tárkony. Ĝis nun la prozodiaj novaĵoj de de Kock ne trovis imitantojn, malgraŭ la ekscitaj figuroplenaj poemoj, per kiuj li ilustris kaj ekzemplis ilin:

Forforeskofarbe la poeto
tuŝas per la lango jen kaj jen
objektojn karajn en la moka mondo.
"Viaj superstrekoj ne videblas!"
Kiam ĉion ciros la nokto for,
fantomos lumlinie la surfacoj
kaj eĉ tra la tero ĉerko fajros.

Al novaj etapoj kaj atingoj

Estas bone kaj nature, ke la pli junaj poetoj deziras forrompiĝi de tio, kio estis pli frue: tiel oni trovas la vojon al novaj etapoj kaj atingoj. Se Maura sin limigas al la tradiciaj metrikoj, li tamen, precipe en la poemoj, kiujn li aldonis por la 2a eldono de sia militdroninta volumo, eluzas kvazaŭ diboĉe la rimeblecojn kaj lingvajn sugestiojn, la sonimitojn kaj riĉajn velurojn de plej rafinita Esperanto:

Oktobraj poploj laŭ la bordoj
lasas de supre,
orgojlaj, sian longan ombron
ondiĝi suple,

ondiĝi kiel la hartufoj
de ia niksina
trupo, se vagas altaj flustroj,
eĥ' malproksima

reelvokante el la nimbo
de ŝiaj blondoj
la nudan korpon, kies himno
trans la jarlongoj

retenas min ĉe l' ludo supla
de briloj okraj
kaj bluaj klaroj alge sub la
poploj oktobraj . .

Tárkony, kies poemoj aperadis en "Literatura mondo" antaŭ kaj tuj post la milito, fine atingis propran volumon, per kiu ni povas studi lian evoluon tra pli ol tridek jaroj. Ĉe li viciĝas la formperfekteco de soneto aŭ tankao, apud plej liberritmaj versoj; en li aperas sensemo rilate lingvaĵon, sentemo rilate la belon; abundas liaj metaforoj:

La ĉielo pompas nun per italece
bluaj farboj,
kvankam vintro proksimiĝas jam per
paŝo plumbo-planda,
en la park' per febre sekaj lipoj trinkas
ĉiuj arboj
la oblikvan ruĝan brilon de la
sun' adiaŭanta.

Aparte menciindas ankaŭ alia "reaperanto": la Sekretaj Sonetoj, tiu himno al la senkondiĉa amoremo, kiu unue vibrigis la esperantistan mondon en 1932 kaj de tiam fariĝis trezora posedaĵo de tiuj feliĉuloj, kiuj sukcesis akiri ĝin, kaj sopirata celo de multaj aliaj, jam reaperis, kune kun aliaj erotikaj poemoj, en *Libro de amo* (1965). Necesas aldoni, ke tiuj, por kiuj la amo haltas antaŭ barilo de pudoro aŭ aludo, ĝin tre malaprobos; sed aliaj, kiuj ne konas tiajn rezervojn, ĝuos la delikatan voluptemon de poezio rekte mala al ĉio, kion

oni komprenas sub la koncepto de krudeco. La verko ne estas tute unika: oni pensas, ekzemple, pri *I Sonetti Lussuriosi* de Pietro Aretino; sed ĝi estas, se nenio alia, perfekta pruvo pri la vivanteco de Esperanto!

En la ombro de la ulmoj kreskas ankaŭ la asfodeloj. Kaj se mencii ĉiujn asfodelojn sur nia dekjara poezia kampo, ja necesos finfine nur katalogi. (Se tiu aŭ alia volas aserti, ke inter la asfodeloj sin trudas unu-du loloj, tio neniel senvalidigas kiel tuton la belan pejzaĝon.) Troviĝas Thorsen, eĉ kun tri volumoj: *Rozoj kaj urtikoj, Pluk* kaj *Sen paraŝuto,* sprito kaj epigrameco apud kelkfoja tre delikata lirika sento. Troviĝas Rossetti kun *Pinta krajono,* kies aparte viglan kaj elaste vervan lingvaĵon ni havos okazon pritrakti ankaŭ sube. Troviĝas la amara vivsentemeco de Emba *(Ekzilo kaj azilo),* la gaja kapriolemo de Georgiev (*Provo alfronti la vivon*), la *Animo prisma* de Chaves, la *Miniaturoj* de Mattos, *Edelvejso* de Nisimura, *Nia lingvo Esperanto* de Vanselow, *Poemoj* de Matkowski, *Nova ezopo* de Urban, *Kantoj por la paco* de Murgin, kaj *Sonetkrono por la esperantistaro* de Petroviĉ. Troviĝas ankaŭ du volumoj de Auld: *La infana raso* kaj *Unufingraj melodioj,* pri kies valoro nur mi en la tuta mondo ne rajtas sentenci. Kaj la plej nova burĝono (ĝuste dum mi verkas tiun ĉi artikolon) estas *Sur la vivovojo* de Logvin; mi tre esperas, ke neniu recenzisto aŭdacos nomi ĉi poemojn simplaj — ilia supraĵa simpleco maskas vere profundan sentemon kaj rezultiĝas de tre profunda talento.

Du poemantologioj

Du poemantologioj aperis dum nia periodo: *Esperanta antologio,* kiu prezentas poemojn de 1887 ĝis 1957 originale verkitajn en Esperanto; kaj *Reeĥoj,* antologio de la originalaj poemoj de 19 — jes, dek naŭ! — jugoslaviaj poetoj, el kiuj unu, Damjan Vahen-Svetinov, ankaŭ eldonis propran poemaron, *Krioj el mallumo,* en 1963.

Ĉio ĉi ŝajnas al mi ne malbona dekjara rikolto por "popolo" ne inter la plej multnombraj. Estas facile por iuj ridindigi nian poezion, se ili ne estas devigataj klare deklari la principojn, laŭ kiuj ili pretendas juĝi ĝin. Neniu objektiva poezileganto, se li nur posedus sufiĉe bone Esperanton, ne estus mirigita je la evoluinta stato kaj la efektivaj atingoj de nia internacia verskulturo.

Sed kompreneble la poezio, se la supro, tamen ne estas la tuta literaturo! Konsentite. Konvenas rigardi ankaŭ la prozon. La romanojn mi aludis supre; ni turnu nin jam al la novelaroj. Jen la nomoj: Baghy, Forge, Francis, Pióro, Ribillard, Rosbach, Rossetti, Szathmári, Szilágyi; ĉu oni povas diri, ke tiu sinsekvo nenion signifas, neniom da valoro heroldas?

Reto Rossetti (*El la maniko,* 1955) famiĝis interalie ankaŭ pro tio, ke al sia novelaro li aldonis liston de la uzitaj interjekcioj (tamen ne ĉiuj; ankaŭ, ekzemple: *Fundamenta krestomatio!*) kun zorga difino pri ilia senco kaj uzo. Kelkaj mokis; sed tio estis esence karakteriza pri la sinteno de Rossetti, kiu kombinas en si je malofta grado zorgon pri la ĉiutaga kaj ĉiufaceta uzado de Esperanto kaj specialan lingvotalenton por ĝin trafe muldi. Rezulte, la vervo de lia lingvaĵo ekzaltas la leganton, eĉ kiam liaj temoj (kiel plej ofte) estas iom leĝeraj. Tiuj, kiuj parolas pri la amatoreco de esperantaj aŭtoroj, memoru, ke Rossetti, same kiel Marjorie Boulton, sukcese eldonis librojn ankaŭ en nacilingvo; delektantoj de la esprimiva Esperanto bedaŭras, ke li ne eldonis pli en la internacia.

La ebriiga lingvo de Ribillard

Alia dibocânto en la lingvo, kies verkoj gustas tre ebriige por lingvofrandanto, estas Ribillard. En siaj du libroj: *Vagado sub palmoj* kaj *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud,* li ameme priskribas la araban mondon de la dezertoj, kaj surfone de tio milde ironias pri la homa konjunkturo entute. Kiel sentemesenseme li konigas rekte al niaj sensorganoj la odorojn kaj parfumojn, gustojn kaj palpumojn de tiu amata etoso!:

En la krepusko dum dise klakis la lastaj pafoj kaj parade kavalkadis la ludintoj, ĉiu domen retiriĝis tra sablaj vojetoj, kiuj disvagis inter murfermitaj ĝardenetoj. Ebriaj je suno, polvo, muziko, kun flankoj tegitaj de blanka ŝaŭmo, la ĉevaloj karakolis kaj baŭmis sub la oblikvaj sagoj de la vespersuno. La ombroj monstre etendiĝis orienten kaj blue alkisis la puncajn fasadojn en groteskaj tordiĝoj. Jam kelkaj steloj palpebrumis kun flirtemaj lampiroj, kiuj morse amdialogis per siaj umbilikaj ampoletoj.



Jean Ribillard en Afriko en 1955

Tiu stilo ne celas leganton, kiu kontentiĝas pri baza vortprovizo; sed ĝi ja estas frandaĵo por maturaj palatoj. Majstro M'Saud parolas al la epikuranoj; li starigas al tradukuntoj problemojn neimageble nevenkiĝemajn, eluzante la kolosajn semantikajn eblecojn de nia lingvo. Laŭ justa sorto, estis ĝuste Rossetti, kiu "trovis" Ribillard'on, rekonante tuj parencan spiriton.

Koko krias jam! (1955) estas la tria novelaro de Szilágyi, kies literatura kariero debutis libroforme en 1929. Szilágyi estas apostolo de la aktualo: ĉiam la leganto subsentas, ke *tio ĉi efektive okazis;* liaj rolantoj vivas en la moderna mondo, estas tuŝataj de la politikaj kaj sociaj realaĵoj, rekoneble reagas al la perradiaj novaĵoj kaj perlaboras sian panon. Lia lingvaĵo spegulas tion: liaj junuloj senĝene kaj facile slangas, ne perfortante la verŝajnecon sed, kontraŭe, gajante laŭ junulecaj vervo kaj trovemo (por ne diri: imitemo):

Vi povus vendi tiun ĉi salamandron al via firmao ... Proponu ĝin al via kuliestro en la butiko. Se vi kondutos lerte, li faligos antaŭ vin kelke da monslipoj.

La aktualeco kaj realeco de Szilágyi etendiĝas eĉ ĝis liaj rakontoj el la esperantista vivo: el sia granda sperto pri nia movado li scias muldi, sen sentimentalo, spritajn kaj antaŭ ĉio verecajn historiojn pri la travivaĵoj de la esperantistoj.

Francis: ironio plus sentemo

La elstara trajto de Francis (*Vitralo,* 1960) estas la ironio. Ĝi ne estas lia sola kvalito — neniu leginto kapablos forgesi la teneran sentemecon de *La vidvino Pirsen,* en kiu li priskribas la izolecon de la maljunaĝo — sed ĝi plejoftas ĉe liaj humoroj. Kvin el liaj rakontoj havas lokon en la fantazia reĝlando Juglando, kie Tarino la Indulga, Karela la Konsterna, kaj similaj kapricemaj regantoj realigas siajn folecojn; kie la plej neverŝajnaj eventoj tre certe okazos; kaj kie kelkaj moroj kaj pretendoj de nia homaro estas senretorike reduktataj al absurdeco. Post Milĵara Paco, du armeoj ekmarŝas unu kontraŭ alia:

Tamen, nun venis la unua averto, ke oni forgesis multon pri la praktika militado dum la Paco, ĉar ambaŭ komandantoj malzorgis asigni spionojn, rezulte, ke la armeoj pretermarŝis unu la alian, ĝis la juglanda trovis sin en gimdala teritorio, kaj la gimdala en juglanda, ne kontaktinte la malamikon. La soldatoj sidis en granda embaraso sentante, ke ili devus aflikti la popolojn per iuj kruelaĵoj konforme kun milithistorio, dum la popolojn regis teruro pro la sama penso. La problemo, tamen, baldaŭ solviĝis, ĉar la popoloj de la invaditaj terenoj ekspedis kurierojn post siajn armeojn kun informo pri la malamiko, kaj konstatinte la situacion, ambaŭ generaloj turnis siajn kolonojn retroire. Tiel, kiel oni poste diris, ili retretis al batalo.

Per la sama glateco li satiras pri iuj aspektoj de nia movado en *Kiel kaj kial Jurgen turniris por damo Liza.* En alia rakonto li priskribas laŭ propraj spertoj realan (anstataŭ fantazian) militon, kaj tiu rakonto estas rimarkinda pro la aerflota terminaro, kiun li kreas kaj realigas:

La motoroj eklaŭtis, kaj la granda aviadilo ruliĝis al la perimetra vojo. Dum ni laŭiris tiun mi ŝargis la pafilojn, poste rimarkante, kiel la antaŭe disigitaj aeroplanoj nun kuniĝinte akompanas nin, ruliĝante plumpe peze al la fino de la ekflug-ŝoseo, kie ni haltis atendante la vicon. Fine ni turniĝis en la ŝoseegon, kaj la motoroj de la bremsita monstro muĝegis prelude al la fina kuro.

Apud la neirontoj, kiuj grupiĝis dekstre mansvingante laŭ la skadra moro, staris la stab-veturilo pentrita de blankaj kaj nigraj kvadratoj. El la vitra kupolo sur ĝia tegmento oni nun signalis permeson iri; la motoroj malkresĉendis ĝis pli normala laŭto, kaj malbremsite ni ruliĝis antaŭen, komence pezsaltete, poste pli kaj pli rapide. La tureto vibradis, la makadamo sube impetis malantaŭen; ni preteris la kutiman limon ekflugan; la vosto leviĝas, sed la peza ŝarĝo ligadis nin al la ŝoseego, kies fino nun apudis. Tra la interkono la voĉo de Bill ordonis plenan forton; la motoroj rekresĉendis, kaj la vosto leviĝis super la nivelo de la pruo, sed la heĝo ĉe la ŝosefino timige alsturmis — kaj pasis sube. Ni lanĉiĝis.

John Francis

Pli emfaza satiro

Ĉe Szathmári (*Maŝinmondo,* 1964) ni trovas satiron pli emfazan ol ĉe Francis. Liaj konceptoj estas samtempe intelektecaj kaj homaranismaj: kiel ĉiuj satiristoj, li trovas la homojn multrilate ridindaj, tamen, estante mem homo, li deziras, ke ili agu pli racie por atingi pli feliĉan socion. Li sprite lecionas al ni; neniu povas diri, ke li admiras la nuran racion, ĉar nurraciaj estas la maŝinoj (samkiel la hinoj en Kazohinio), kaj tion, kion ili alvenas per sia racio, li evidente ne aprobas; sed la homoj siaflanke devas eviti kelkajn evidentajn stultaĵojn. Profunda pensulo, efektive, kaj akra observanto.

Rosbach en sia dua novelaro (*Homoj kaj riveroj,* 1957) denove trompas nin per sia ŝajne trankvila kaj aplomba kvieto. Sen sensacioj li ĉerpas el siaj vivospertoj, priskribante la junulojn kaj same la militterurojn el vidpunkto de homo kiu bone konas ambaŭ mediojn. La (reala aŭ ŝajna) aŭtobiografia tono efikas ege varme kaj varmige. La plezuro, kiun oni ricevas el liaj rakontoj, estas simpla kaj kontentiganta; tralumas lia personeco de homo benigna kaj fortanima.

Jean Forge kulpas leĝeron en *La verda raketo* (1961). Li mem nomas ĝin "satira novelaro el Esperantujo", sed la satiro vere ne estas, en la plimultaj kazoj, tre pika, ĝuste ĉar mankas (almenaŭ laŭ mia kompreno) la realeca

La originala esperanta literaturo

bazo, kiun nepre postulas ĉiu satiro. Mi ne volas esti maljusta: tiu ĉi aŭtoro scias amuzi — kaj tio tre certe estas lia ĉefcelo! — sed en la kadro de literatura studo li devas preni malsupran lokon. Lia raketo (se mi rajtas uzi tiun vorton ĉi-foje en senco de artfajraĵo) ofte soras kaj flagras belete — sed postlasas nenion, krom fulge elbrulinta ŝelo.

La plej nova novelaro, *El tero kaj etero* de Julia Pióro (1965), alportas tute novan voĉon al ni; mi ankoraŭ ne havis tempon por atingi konkretan opinion pri ŝiaj kurioze allogaj fabeloj.

Ankaŭ pri niaj noveloj ni jam posedas antologion: *33 rakontoj,* en redakto de Rossetti kaj Szilágyi, kiu donas interesan kaj valoran superrigardon tra tiu ĉi artformo en Esperanto; kiel *Esperanta antologio* ĝi havas la malfortojn de ĉiaj antologioj (ĉefe, ke ĝi devas esti tro minimuma), sed ĝi estas nepra legaĵo por ĉiu literaturemulo.

Pri la dramo en nia periodo, ne multo estas direnda. Se mi ne eraras, aperis (krom la ambicia *Sonĝe sub pomarbo* de Baghy) nur du volumoj: *Jozefo* de Applebaum (1957), kaj *Virino ĉe la landlimo* de Marjorie Boulton (1959). La unua, versdramo, rerakontas la historion pri la biblia Jozefo (historio, al kiu vere ne mankas drameco), sed ĝiaj heksametroj kreas etoson ĝene iom eksmodan. La alia estas kolekto de unuaktaĵoj, variantaj inter tragedio kaj grupvespera komedio. La plej ambiciaj (kaj sukcese frapantaj) estas versaj.

Nefikciaj verkoj

Fine, necesas almenaŭ ekrigardi tiujn librojn, kiuj estas nek poeziaj, nek romanoj nek noveloj. Ili inkluzivas fakverkojn, ekz-e *La bela subtera mondo* (1959) de la fama speleologo Leander Tell; aŭtobiografion, ekz-e *Ŝipestro rakontas* (1962) de Kapitano F. T. Lundquist; rememorojn, ekz-e *Aventuroj de pioniro* (1963) de Edmond Privat (kies *Junaĝa verkaro* estis eldonita en 1960); kaj sciencajn traktaĵojn, ekz-e *Elektitaj prelegoj de ISU* kaj *Sciencaj studoj.* Sed grandan kaj imponan kolekton formas ĝuste tiuj verkoj, kiuj pritraktas la esperantismon kaj la esperantologion. Eĉ tiuj, kiuj ne volas vidi iun apartan internacian kulturon esprimiĝantan per la Internacia Lingvo, ne povas nei, ke tiu ĉi fako prezentas pure esperantan fenomenon — ĉar sen la Internacia Lingvo ĝi ja ne povus ekzisti.
Pensu nur pri *Lingvo kaj vivo* de Waringhien, *Retoriko* (2a eldono) de Lapenna, *Memorlibro pri la zamenhofa jaro, La zamenhofa esperanto, Lingvo stilo formo* (dua eld.), *Planlingvaj problemoj,* kaj *Dialekto dialektiko,* kies ekzistorajto kaj inspiro estas ĝuste la lingvo mem! Pensu pri *Eseoj I* de Waringhien kaj *Kvar prelegoj* de Kralj, kiuj ekestiĝis surbaze de la esperanta literaturo (literaturo jam tiel ampleksa, cetere, ke ekverki ampleksan historion pri ĝi mi daŭre timeme hezitas komenci!). Pensu pri la reaperintaj originaloj de Zamenhof mem: *Proverbaro esperanta* kaj *Lingvaj respondoj,* tiuj bazoj de nia tuta lingva kulturo. Pensu pri la klera, eble definitiva biografio pri *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* verkita de Marjorie Boulton kaj eldonita ankaŭ en angla traduko. (Menciindas, ke ankaŭ alia valora verko, *Nepalo malfermas la pordon* de Tibor Sekelj, aperis en tradukoj, interalie en angla lingvo de M. Boulton.) Pensu pri *Esperanto kaj lernejo,* pedagogia kolekto tre valora precipe en la nuna stadio de niaj klopodoj. Pensu antaŭ ĉio pri *Specimene* de Baupierre, kies arlekenaĵoj (parodioj pri esperantaj aŭtoroj) spitas al ĉiu filistro, kiu papagas, ke Esperanto ne povas havi literaturon, estas nura sensanga kodo, kaj ne vivkapablas! Pensu pri ĉio ĉi kaj fieru, amiko! — ne kuntiru vin antaŭ la pretendoj de tiuj, kiuj tamburas malsuperecon de la internacilingva kulturo!

Rekomendinda aŭtobiografio

Mi volas per aparta alineeto mencii ankaŭ la trian eldonon de unu verko, kiu ĉiam delonge donis al mi apartan plezuron: *En Ĉinio batalanta,* aŭtobiografio de japana virino, kiu akompanis sian ĉinan edzon al Ĉinujo dum militis iliaj landoj unu kontraŭ alia: la sola komuna lingvo de la geedzoj estis Esperanto. Mi rekomendas la libron por orientiĝo de tiuj, por kiuj Esperanto estas "nura helplingvo": por iuj ĝi rolis ĉeflingve — legu kaj pripensu!

Novelo de tiu sama Hasegaŭa Teru troviĝas inter la elektita enhavo de *Japana Kvodlibeto* (1965), libro treege bonvena en la nuna tempo de pligrandiĝanta agado far niaj japanaj originalistoj, kaj enhavanta poemojn kaj prozaĵojn el ĉiuj epokoj de la japana Esperantismo. Samtempe kun tiu kolekto aperas *Maskerado ĉirkaŭ la morto* de Teodoro S. Ŝvarc, la rememoroj de judo en milittempa Budapeŝto — libro, kiu potence aldonas al la listo de aŭtobiografioj en nia lingvo.

Oni tro emas rigardi la esperantan literaturon el starpunkto de la naciaj lingvoj, kaj juĝi ĝin laŭe. Estas utile kaj certagrade revelacie inversigi tiun pensmanieron kaj rigardi la naciajn lingvojn el starpunkto de la esperanta literaturo: mankoj ja ne mankos! Certagrade estas simpatia la naŭziĝo de iuj, kiuj tediĝas pri tro facilaj laŭdoj pri ĉio originale esperanta; tamen ankaŭ ne estas saĝe, impeti al la malo. La vero troviĝas, kiel kutime, ie inter la ekstremoj. Ni starigu niajn juĝojn surbaze de studoj pli ol suprajaj; ni rigardu iom la faktojn. Ni memoru, ke literaturo estas antaŭ ĉio *lingva* fenomeno, kaj lingvoj — inkluzive Esperanton — malsimilas inter si: same literaturoj. Pri la niaj ne nepras honti.

Glosoj

delekti: daŭre kaj aprece ĝui ion plezurigan.
benigna: bonkaraktera, senmalica.
fola: iom freneza.

LA SUBSKRIBO-KOLEKTADO DAŬROS EN 1966!

Nova limdato: 31 julio 1966

Kiel la leganto eble jam eksciis el la ĉefartikolo de la Prezidanto de UEA, ĉiuj agadoj de UEA ligitaj kun la Jaro de Internacia Kunlaboro 1965 pludaŭros en la nova jaro 1966 en ligo kun la 20-a datreveno de la fondo de Unesko. Tio signifas, interalie, ke estos eble, tre rimarkinde altigi la nombron de la subskriboj kolektitaj por la speciala Propono al Unuiĝintaj Nacioj. Se dum la pasinta jaro la Propono ricevis pli ol ½ miliono da individuaj subskriboj, en 1966 ne devus esti malfacile levi la sumon ĝis almenaŭ unu miliono.

La preciza stato de la afero je la 3-a de decembro 1965 estis jena: subskribis entute (laŭ la folioj jam ricevitaj en la Centra Oficejo) **510 847 individuoj en 58 landoj, kaj 2771 organizaĵoj diversspecaj** (kies sumigita membrarc atingas preskaŭ 48 milionojn).

La plej amase kontribuintaj landoj estas ankoraŭ Japanujo (153 351 individuoj), Bulgarujo (97 899) kaj Hungarujo (30 037), dum Monako, Bulgarujo kaj Hungarujo tenas la unuajn tri lokojn, se oni kalkulas proporcie al la koncerna loĝantaro. Pri Norvegujo evidentiĝis, ke la kolektado tamen progresis, kvankam Norvega Esperantista Ligo pro specialaj malfavoraj cirkonstancoj en la administrado ne povis sendi frue la foliojn al Rotterdam. Nun jam la C.O. ricevis la unuajn milojn el tiu lando. Landoj nur en la lasta tempo ekkontribuintaj estas Turkujo, Mongolujo, Irano kaj Filipinoj, el kiuj la du lastaj dank' al tre utila transazia vojaĝo de s-ino Mary Murray el Usono. Estas kuraĝige konstati, ke eĉ en kelkaj landoj, kie la kolektado estas malhelpata kaj eĉ malpermesita, nombro da membroj spite kunlaboras. En aliaj landoj pliaj individuoj atingas grandajn rezultojn: s-ro Standi Čáp (Ĉeĥoslovakujo) kolektis 3855 individuajn subskribojn, s-ro Adalbert Masuhr (Germanujo) 1880. Germana Esperanto-Asocio turnis sin al ĉiuj parlamentanoj per presitaj cirkuleroj, el kiuj unu koncize prezentas la ĝisnunajn rezultojn de la kampanjo. Sendube aliaj landaj asocioj povus utiligi tiujn dokumentojn kiel modelojn.

Usonaj lingvistoj kaj intelektuloj

Estus neeble mencii ĉiujn eminentajn subskribintojn, sed ĉi-monate riĉigis la rikolton aro da usonaj lingvistoj kaj aliaj, kies apogon al la Propono akiris d-ro Julius Balbin. La liston kronas monde konataj nomoj kiel tiuj de Uriel Weinreich, Tibor Halasi-Kun, John Lotz, Karl Menges kaj Mario Pei, ĉiuj profesoroj pri lingvaj fakoj.

Subskribis ankaŭ s-ro G. Modis, eksministro de Grekujo; la financministro de la ŝtato Nordrhein-Westfalen, Germanujo; prof. Rinĉen, membro de la Mongola Scienca Akademio; kaj la urbestroj i.a. de Ateno kaj de Mainz.

La ĉefaj novaj organizaĵoj subskribintaj estas unu politika partio, la Socialdemokrata Partio de Germanujo (700 000 membroj) kaj du grandaj sindikatoj: la Fervojista Sindikato de Aŭstrujo (120 000 membroj) kaj la Industria Sindikato "Metalo" en Germanujo (1 951 000 membroj).

Estonta agado por la Propono

La konsiderinda plilongigo de la kampanjo necesigos iom da replanado sur ĉiuj niveloj. Ĉe la centro, UEA jam represigas la subskribofoliojn, antaŭvidante novajn mendojn de la landaj asocioj. Ĉi tiuj siavice sendube ricevos novajn mendojn de ĉiuj lokaj grupoj. En multaj kazoj necesos represigi la foliojn kun nacilingva teksto. Ankoraŭ tuj disponeblaj el la Centro Oficejo estas folioj kun angla aŭ hispana teksto.

Samtempe necesos nova diskonigo de la kampanjo al grupanoj kaj individuoj, precipe akcentante la plilongigon kaj klopodante aktivigi la ĝis nun neaktivajn anojn. Ankaŭ al la nacilingva gazetaro la informado devus nun pliintensiĝi. Multaj gazetoj, inter kiuj estas menciinda la "Kroniko de Unesko", jam dum 1965 raportis pri la kampanjo, kaj ĉe ili la grundo estas tial jam preparita.



La 17-an de oktobro la Junula Sekcio de la Esperanto-Grupo de Como (Italujo) organizis specialan unutagan kampanjon por kolektado de subskriboj, okaze de junulara renkontiĝo de italaj kaj svisaj esperantistoj. Afiŝoj kaj stando (videbla fone, maldekstre) en la urbocentra placo allogis la dimanĉajn promenantojn. En sep horoj (de la 10-a ĝis la 17-a) la stando rikoltis 1068 individuajn subskribojn. Ĝuste la junularo de la urbo plej volonte subskribis. Pluraj gazetoj raportis.

PRAKTIKA ABOCO DE UEA POR NOVAJ MEMBROJ

La agado de UEA estas jam tiel vasta, ke eĉ malnovaj membroj ne ĉiam facile orientiĝas. Tial ni unu fojon publikigas telegramecan resumon de ĉiuj ĉefaj sciindaĵoj. Por pli detalaj informoj oni kompreneble turnu sin al la indeksoj de la Jarlibro kaj "Esperanto".

Akademio de Esperanto
Instanco sendependa, sed subvenciata de UEA. Celas gardi la unuecon de la lingvo. Publikigas siajn decidojn laŭbezone.

Belartaj Konkursoj
Ĉiujara aranĝo. Servas ĉefe por stimuli verkistojn kaj tradukistojn. La plej bonaj konkursaĵoj gajnas monpremiojn.

Biblioteko "Hector Hodler"
La biblioteko de UEA; troviĝas en la Centra Oficejo. Unu el la plej grandaj en la mondo. Ĉiu vizitanta membro povas ĝin uzi, sed nenio estas elpruntebla. La bibliotekisto laŭeble respondas perpoŝtajn informpetojn.

Centra Oficejo
Plenumas ĉiujn rutinajn laborojn de UEA: administrado de la membraro kaj Universalaj Kongresoj, eldonado de revuoj kaj Jarlibro, vendado de libroj kaj gazetoj.

Centro de Esploroj kaj Dokumentado (CED)
Instanco de UEA. Entreprenas sciencajn esplorojn kaj kolektas informojn pri Esperanto por disponigi ilin al internaciaj organizaĵoj kaj aliaj. Eldonas dokumentojn ĉefe en la angla kaj Esperanto. La dokumentojn oni tamen mendu ne ĉe CED, sed ĉe la Centra Oficejo.

Ĉambroj de UEA
En la Domo de UEA, kie troviĝas i.a. la Centra Oficejo, diversaj ĉambroj portas la nomojn de landoj aŭ personoj laŭ la asocioj kaj individuoj, kiuj tiucele donacis po 5000,— gld.

Delegitoj de UEA
Membroj, kiuj sin anoncas por senpage plenumi diversajn servojn por aliaj membroj.

Estraro
Maksimume 8 personoj, kiuj gvidas la agadon de la Asocio. Respondecas al la Komitato, kiu ĝin elektas. Gravajn proponojn oni prefere direktu, ne rekte al la Estraro, sed unuavice al sialanda komitatano. Ĉiujn aliajn proponojn kaj demandojn oni adresu al la Centra Oficejo.

Fakaj asocioj
La plimulto estas ligitaj kun UEA per kontraktoj pri kunlaboro. Neŭtralaj fakaj asocioj povas aliĝi kolektive al UEA.

Informa Fako
Instanco de UEA kun landaj branĉoj. Gvidas la informadon pri Esperanto en aliaj lingvoj. Eldonas la bultenojn de la Internacia Gazetara Servo en Esperanto kaj la angla kaj franca.

Internacia Arta Teatro (IAT)
Ne posedas propran ejon, sed ludas en kongresoj. Subvenciata de UEA.

Internacia Somera Universitato (ISU)
Parto de la regula programo de la Universalaj Kongresoj. La prelegojn de ISU rajtas ĉeesti ĉiuj kongresanoj.

Komitato
La "parlamento" de UEA. Kunvenas normale unu fojon jare, dum la Universala Kongreso. Krome laboras per cirkuleroj. Parton de la Komitato elektas la aliĝintaj asocioj; duan parton elektas la delegitoj; la trian parton alelektas la du unuaj partoj.

Koresponda Servo Mondskala (KSM)
Sub aŭspicio de UEA, tamen servas ankaŭ al ne-membroj. Senpage (nur kontraŭ respondkupono) interligas plumamikojn.

Laborplano
La Dua Baza Laborplano de UEA, akceptita en 1962, difinas la kampon de agado ne nur por la centraj organoj, sed ankaŭ por la landaj asocioj kaj lokaj societoj. Ĝi estas senpage ricevebla. Ĉiu povas, trastudante ĝin, distingi tiujn taskojn, per kiuj li povas mem plej utile kontribui al la agado.

Landaj asocioj
La plimulto estas aliĝintaj al UEA, kaj iliaj membroj estas aŭtomate asociaj membroj de UEA. Aliĝintaj asocioj elektas komitatanojn de UEA kaj tiel rekte partoprenas ĝian gvidadon.

Magnetofona Servo
La centro en Kanado disvendas kaj interŝanĝas surbendigitajn programojn en Esperanto. Sub aŭspicio de UEA, tamen memfinanca.

Principaro de Frostavallen
Temas pri la principoj de la informado pri Esperanto. La 21 artikolojn aprobis kunveno de Informaj Fakoj en 1956. Ne nur la Informaj Fakoj, sed ĉiu individuo povas studi la Principaron profite, precipe por eviti erarojn.

Rilatoj kun Unesko
UEA jam de 1954 havas Konsultajn Rilatojn kun Unesko. Tio signifas, ke UEA laŭeble kontribuas al la celoj de Unesko, reprezentiĝas en ĝiaj konferencoj kaj interŝanĝas informojn.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
La junulara sekcio de UEA. Konsistas el junaj membroj de UEA plus aliĝintaj landaj sekcioj. Eldonas propran revuon, organizas proprajn kongresojn.

Universala Ekspozicio
Granda kvanto da ekspoziciaj materialoj, plejparte libroj en Esperanto. Troviĝas en la Centra Oficejo. Ĉiu povas prunte ricevi la materialojn, kiu intencas aranĝi ekspozicion kaj kiu pagas ambaŭ-direktan transporton.

Universala Kongreso (UK)
La plej granda ĉiujara Esperanto-kongreso. Servas samtempe kiel publika manifestacio kaj kiel kadro por la laboroj de UEA kaj aliaj organizaĵoj ligitaj al ĝi. Estas ankaŭ tre grava socia kaj kultura aranĝo. Ĉiu povas partopreni, kiu pagas aliĝon; individuaj membroj de UEA ricevas rabaton.

GVIDLIBRO LAŬ PRAKTIKA PLANO

Gvidlibro tra Paris, de Julieta. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1965. 249 p. 21 x 14 cm., il. 9,30 gld. (37,2st.)*

Jen gvidlibro laŭ tre praktika plano. Ĝi pritraktas la urbon per sufiĉe malgrandaj sekcioj. Komence de ĉiu ĉapitro la aŭtoro indikas stacidomon de la subtera fervojo 'Metro' kiel elirpunkton, la tempon kiun oni bezonos por la vizito pritraktota, kaj la distancon kiun oni devos piede trairi. Je la fino de la ĉapitro oni troviĝas denove ĉe 'metrostacio'. La ĉapitro priskribas la vojon sekvendan, rimarkigas la interesaĵojn, kaj donas 'iom da historio'. Tiu 'iom' sufiĉos por interesi kaj eĉ amuzi, ĉar la stilo estas vigla. La aŭtoro sukcesas transdoni sian entuziasmon por 'sia vilaĝo'. Finfine, verko vere rekomendinda por ĉiu vizitanto, precipe por tiu, kiu ne antaŭe konas la urbon. Tiom rekomendinda ĝi estas, ke oni kuraĝas sugesti plibonigojn! Estas bedaŭrinde, ke mankas indekso. Mankas ankaŭ glosoj. Tamen ne ĉiu esperantista vizitanto, kiun celas la verko, konos la signifon de tiaj vortoj kiel 'slabo' kaj 'bazamento' — kiuj eĉ ne troviĝas en la Plena Vortaro nek en ties Suplemento. Oni rimarkas interesan (ĉu imitindan?) uzon de 'el' kaj 'de' por indiki respektive la artiston kaj la bildigiton de artverko; ekz. 'La famaj Nimphéas *el* Claude Monet' sed 'Statuo *de* la Sankta Virgulino'. La verkon plibeligas agrablaj ilustraĵoj 'el' la aŭtoro, kiu desegnis ankaŭ la allogan kovrilon.

J. Gifford Fowler (Londono)

Mio mia, poemaro de Walerian Włodarczyk. Eld. Pola E-Junularo, Vroclavo, 1965. 66 p. 19 x 11 cm., ofsetita. Kvanto 825 ekz. 1,75 gld.*

Walerian Włodarczyk estas meritplena esperantisto. Ni nur menciu liajn intervjuojn en la libro "Esperanto?".

Sed liaj multvaloraj kvalitoj ne nepre inkluvizas, ke Włodarczyk (jam) estas poeto. Tralegante lian poemaron "Mio Mia", oni ricevas la impreson, ke farado de versaĵo estas tre simpla laboro, ĉar la aŭtoro flankenŝovis ĉiujn leĝojn de la poetiko kaj senĝene preterpasis la fakton, ke poezio en certa senco estas metio, por kiu oni ankaŭ devas lerni la laborprocedojn.

Lia plene ne-ligita lingvo-uzado malebligas poemon kaj eble povus alproksimiĝi al poezia prozo, se lia vortuzado estus malpli primitiva. La aŭtoro ŝatas ekz. la sufiksojn — et kaj — eg. Sekve oni povas abunde, trafe aŭ netrafe, renkonti ilin:

Por iu vi — Juvelo eteta, Sunet' brilanta,
Koreto karega, Birdeto eta . . .
(el "La Papilio")

Ekster tio oni plurfoje haltas antaŭ nepuraj metaforaj esprimoj aŭ antaŭ nenecesaj vort- kaj versripetoj. La rezulto estas, ke lia poezio nenie emocie, malgraŭ la ofte delikataj temoj, tuŝas la leganton.

E. Borsboom (Tübingen)

En la plej nova

MONDA KULTURO

(n-ro 13) vi povas legi i.a.:

"La enigmo pri Hamleto", studo de William Auld.
"Fronte al ĝi", artikolo pri homa angoro de Paul Voivenel, kuracisto-verkisto franca.
"La poeto de suno, amo kaj forto", artikoloj pri J. Rainis, kun tradukilustroj.
"La karitato kaj la justeco", brazila poemo de Guerra Junqueiro, tr. Knoedt.
"Unua eklogo" de Publius Vergilius-Maro, el la latina tradukita de Kalocsay.
"La statuo kaj la busto", poemo de Robert Browning, tr. M. Boulton.
"Erinaca lulkanto", poemo de Annie M. G. Schmidt, el la nederlanda tr. Makkink.
"Ekskurso kun la knabinoj", proza skizo de anglino Nell Dunn, tr. Auld.
"La morto de Utamaro", ilustrita novelo de Miyamoto masao pri fama artisto.

Kaj ankoraŭ: recenzon de J. Tortel pri "Kataki" en Tokio; leterojn de legantoj; diversaĵojn. Abonu jam tuj por 1966!

Esperanta mozaiko, de Gösta Henriksson, Eld. la aŭtoro, Malmö, 1965. 46 p. 22 x 17 cm., 2,80 gld. (11,2 st.)*

Tiu ĉi plaĉe multobligita kajero prezentas interesajn raportojn kaj opiniojn de tre agema kaj modele laboranta sveda esperantisto kun legindaj rememoroj kaj bonaj konsiloj por alilandaj movadoj kaj grupoj. Li estis adepto de Andreo Cseh depost 1927 kaj nun li abunde donas el siaj spertoj dum la tiea kluba vivo, kun la konkludo: "Ĉu Esperanto plenumis miajn supozojn kaj dezirojn? Jes, pli ol plenumis . . . Mirinde!" . . . "malfermante al mi novajn antaŭe kaŝitajn vivovalorojn." Konvinkiĝu legante ĝin!

P. Balkányi (Budapest)

Mesaĝo de 'Abdu'l-Bahá de 17 dec. 1919. Eld. Nacia Spirita Konsilantaro de la Bahaanoj en Germanujo, Frankfurt am Main, 1964. 15 p. 21 x 15 cm.

Resumo: Al la Centra Organizo por Daŭra Paco (Hago) la filo de la fondinto de Bahaismo esprimis sian apogon kaj klarigis la kondiĉojn por paco laŭ la instruoj de Baha'u'llah.

(daŭrigo sur p. 12)

KONGRES-
LANDAJ
SCENOJ













Maldekstre: La 370-ĉambra studenta hejmo en Graz, ejo de la 2-a Internacia Lerneja Konferenco; la ĉefa placo de Pécs, urbo de la TEJO-kongreso 1966.

Centre: Ĉedanubaj scenoj el Budapest: la parlamentejo kaj Elizabeta Ponto; hungaraj popolartaĵoj.

Dekstre: Preĝejo en Szeged, urbo vizitota dum la postkongresa ekskurso; sur lago Balaton.

Freedom of Speech (Paroli libere). Eld. Brita E-Asocio, Londono, 1965. 35 p. 22 x 14 cm., il. Varba broŝuro anglalingva. 1 ŝil.

Ĉi tiu informlibreto kunigas kelkajn bonegajn ideojn kun multe da fuŝinformismo. La trafbrila fotpaĝo kontraste montranta plurlingvan kongreson kun kapaŭdiloj kaj Esperantlingvan kongreson kun senpera kompreno povus enkonduki informilon komprenigantan la urĝan mondan bezonon al Esperanto. Sed la multaj tiucelaj informaĵoj senorde disas tra la libreto. Inter la bone elpensitaj kaj verkitaj eroj estas ankaŭ kelkaj infanecaĵoj kaj kultismaĵoj. La plej granda eraro estas la panikeca peno instrui al "negramatikuloj" en 6-paĝa spaco *kaj* la anglalingvan gramatikon *kaj* certan kvanton da Esperanto. Krome, la multaj britismoj kaj reklamoj por B.E.A. limigos la utilon de la libreto — se entute ĝi utilos — al Britujo.

Jonathan Pool (Usono)

Islanda-Esperanta vortaro, de Baldvin B. Skaftfell. Eld. Federacio de Islandaj E-istoj, Rejkjaviko, 1965. 479 p. 21 x 14 cm., bind.

Manifesto al la germana popolo kaj al la popoloj kaj registaroj de la mondo. Eld. Berlino, 1965. 8 p. 21 x 15 cm.

Kio estas la BLE? Eld. Budhana Ligo E-ista, 66, Rue Vivegnis, Liège, Belgujo. 1965. 5 p. 27 x 21 cm. Senpaga.

Hispanio por vi. Eld. Subsecretaría de Turismo, Madrid, 1965. 71 p., 22 x 12 cm., il. Senpaga? (Enlanda prezo: 10 pesetoj).

Dünya Dili Esperanto (Monda lingvo Eo), de Hayrettin Dural. Eld. la aŭtoro, Ankara, 1965. 2000 ekz. 128 p. 24 x 16 cm. Lernolibro por turkoj. 3,— gld. *

Jarlibro de Japana Esperanto-Movado, 1965. Eld. Japana E-Instituto. 30 p. 20 x 15 cm. (Ĉefe japanlingva; enhavas i.a. bibliografion de japanaj E-eldonaĵoj postmilitaj).

Bona rido... Komp. kaj tr. Axel. A. Helm. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1965. 85 p. 19 x 12 cm., il. Anekdotaro. 5,25 gld.*

Örebro, la urbo kaj gubernio. Eld. Turistinformejo, Gamla Teatern, Storgatan 1, Örebro, Svedujo. Senpaga turisma faldfolio kolora.

Esperanto, Lingvo Internacia, de Leo Turno. Traduke adaptis H. Maŝler. Eld. E-Ligo Israela, Tel-Aviv, 1965. 76 p. 23 x 16 cm., Ofsetita. Lernolibro por hebrelingvanoj.

Ĉies Fatimo. Traduke komp. G. D. Walton. Eld. Casa Beato Nuno, Fatimo, Portugalujo, 1965. 54 p. 16 x 10 cm., il. kun mapo. Gvidlibro por pilgrimantoj. 1,85 gld. *

Voko. Eld. L. G. Hartridge, 64 Laurier Road, Addiscombe, Croydon, Surrey, Britujo. Simpla vortludo per kartoj, por anglalingvaj komencantoj de Esperanto. 1 ŝ. 6 p. por unu kartaro, ink. afranko.

NEKROLOGOJ

EMILO PFEFFER (1891-1965)

D-ro Emilo Pfeffer forpasis la 20-an de novembro en Montevideo. Li naskiĝis en Krakovo, Polujo. Sian majstran tradukon de la latina novelo de Apulejus "Amoro kaj Psiĥe" li faris ankoraŭ 17-jara. Sekvis ankoraŭ multaj aliaj tradukoj, inter kiuj restis ne eldonita la germana ĉefverko de Gerhart Hauptmann "La teksistoj". Same la manuskripto de Esperanto-Krestomatio, de li redaktita kaj planita kiel daŭrigo de la Fundamenta Krestomatio. Konata estas la serio de liaj gramatikoj, legolibroj kaj vortaroj, en la pola kaj germana. En Vieno en 1919-20 li redaktis la gazeton "La Esperantisto", en 1930-31 "Die Weltsprache". La Hitlera reĝimo devigis lin elmigri kaj de 1938 li loĝis en Montevideo.

HANS TRESSEL

La 27-an de oktobro je aĝo de 85 jaroj forpasis en Munkeno s-ro Hans Tressel, honora kaj dumviva membro de UEA, distingita per la kruco de merito de la Federacia Respubliko Germanujo pro liaj meritoj por Esperanto. Li estis la plej malnova esperantisto en Munkeno, jam de 1911 la tiea delegito de UEA, kaj tre vaste konata.

J. FAHNER

Mortis 86-jara en Toulon kapitano J. Fahner, oficiro de la Honora Legio. Li lernis Esperanton en 1906 kaj gvidis la unuan kurson en la franca mararmeo.

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *Reorganizi la subskribo-kolektadon* sur loka nivelo pro la plilongigo de la kampanjo ĝis la 31-a de julio 1966. (Vidu la artikolojn sur p. 1 kaj 7). Laŭbezone mendi pliajn subskribo-foliojn de la landa asocio aŭ de UEA.

2. *Plani la lokan agadon por 1966* surbaze de la laborplano de la Jaro de Internacia Kunlaboro ("Esperanto" januaro 1965, p. 2-5), sed kun speciala atento en 1966 al la laboro de Unesko — do al temoj el edukado, scienco kaj kulturo.

3. *Varbi inter la membroj de la grupo* novajn individuajn membrojn de UEA, tiel ke la grupo, kiel varbinto, ricevos librojn aŭ aliajn premiojn, ekzemple por riĉigi la kluban bibliotekon. (Vidu detalojn en "Esperanto", decembro 1965, p. 201, 221.)

4. *Varbi por la Universala Kongreso* en Budapest (aliĝiloj kaj ilustrita Unua Bulteno mendeblaj senpage el la Centra Oficejo) kaj diskonigi kaj klarigi al la grupanoj la kondiĉojn por ricevo de hungara vizo (Vidu p. 15).

5. *Mendi la sonbendon* pri la Unua Labora Sekcio de la Tokia UK (vd. decembro, p. 219) pri "Aspektoj de Internacia Kunlaborado" kaj aŭdigi en la grupo la plej interesajn partojn por veki diskuton pri tiu temo.

LAŬFAKE

Kampado

• Tuj post la 51-a UK okazos en Hungarujo, ĉe lago Balaton, kongreso de la Internacia Federacio de Kampado kaj Karavanado. E-istoj, kiuj intencas partopreni, bv. kontakti kun la Centro de la Esperantistaj Kampadistoj, 63 ave. Carnot, 33 Bordeaux-Cauderan, Francujo.

Kino

• Laŭ "El Popola Ĉinio" la Centra Farejo de Novaĵaj kaj Dokumentaj Filmoj produktis Esperantan koloran filmon "Brila Festotago". Prezento daŭras ĉ. 1 horon. Temo: la 15-a datreveno de la Ĉina Popola Respubliko.

Radio

• Komenciĝis Esperantlingva rubriko en la revuo "Radio-REF", organo de la Reto de Elsendantoj Francaj. La rubriko inkluzivas E-lecionojn.

Religio

• Komenciĝis ĉiumonata evangeli-kristana Diservo en Esperanto en la regiono de Manchester, Britujo. La unuan ĉeestis 30 personoj.

Scienco

• La katalunlingva scienca bulteno "Puig Castellar" (San José 20, Santa Coloma de Gramanet, Hisp.), kiu ampleksas ĉefe historion, antropologion, geologion k.s., ek de 1965 aperas kun resumoj en Esperanto.

LAŬLANDE

Brazilo

• En la oficiala kadro de la festoj pri la 400-jareco de Rio de Janeiro okazis en oktobro la 19-a Brazila E-Kongreso. Partoprenis multaj eminentuloj, i.a. la prezidanto de la Brazila Akademio de Filologio kaj la rektoroj de la Universitato de Brazilo kaj la Universitato de Guanabara. En la inaŭguro salutis per sonbendo la prezidanto de UEA.

Britujo

• Du organizaĵoj: British Centre of Information (10 Blenheim St., London, W.1) kaj Central Bureau for Educational Visits and Exchanges (55a Duke Street, London, W.1) eldonas listojn de lingvo-kursoj en eksterlando, kiujn povus partopreni britaj gejunuloj. Organizantoj de tiaj kursoj de Esperanto informu anticipe la menciitajn adresojn.

Bulgarujo

• La turista sekcio de BEA kreskis de 103 ĝis 274 personoj en 9 monatoj. Ĝia biblioteko de turismaj eldonaĵoj ampleksas 462 erojn. Ĉisomere ĝi informis en turismaj medioj per ekspozicio kaj per 5 000 flugfolioj.

Germanujo

• El Berlino orienta aperis la unua eldono de revuo "Der Esperantist". Parte nacilingva, ĝi aperos 6-foje jare. La unua kajero difinas la taskojn kaj politikon de la Centra Laborrondo de Esperanto-amikoj kaj prezentas enkondukon en la E-gramatikon kun konciza vortaro. Ĝis la fino de 1965 stariĝis grupoj en 9 urboj de orienta Germanujo.

Hungarujo

• En dekmil ekz. aperis la 6-a eldono de la lernolibro de Julio Baghy, okaze de la 51-a UK. Samtempe aperis nova ilustrita lernolibro por elementaj lernejoj.

• K.K.S. Glauco Pompilio prelegis sinsekve en la ĉefaj budapeŝtaj E-Grupoj pri la preparoj por la 51-a UK kaj pri la laboro de UEA. Li aperis ankaŭ en 15-minuta televida intervjuo.

Japanujo

• La 52-an Kongreson de Japanaj E-istoj en Tokio, 23-24 oktobro, partoprenis 436 personoj, krom 60 neesperantistoj, kiuj venis aŭskulti Cseh-metodan lecionon de s-ino M. Haudebine.

• La julia-oktobra kajero de la revuo "Oomoto" enhavas abunde ilustritajn raportojn pri la Internacia Oomoto-Festivalo kaj la 50-a U.K. La kajero ampleksas 64 paĝojn.

Jugoslavio



• Esperanto-semajnon en oktobro inaŭguris en Zagreb unuaranga ekspozicio organizita de tramista grupo. Ĝi festis samtempe la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj kaj la 10-jaran ekziston de la grupo. La materialojn prezentis 20 ekranoj profesie pentritaj. (Foto)

Pollando

• Ĉefdelegito de UEA Roman Sakowicz aranĝis en septembro konferencon de polaj delegitoj de UEA. Ĉeestis 40. Krom raportoj pri la agado ili prezentis sukcesan teatraĵon "Krio de l' sango".

Sudafriko

• Dum oktobro kaj novembro la Sudafrika E-Asocio sukcesis plurfoje penetri en gravajn informmediojn: precipe per afrikansa radiointervjuo kaj longaj artikoloj en gazetoj, pri Esperanto kaj la Propono al U.N.

Vjetnamujo

• Vjetnama Pacdefenda E-ista Asocio komencis eldoni ek de oktobro neregulan simple presitan periodaĵon "Informado".

LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando



EKSPERIMENTO EN "LA MUELEJOJ": ESPERANTO OFICIALIGITA.

Ĉu vi memoras la ĉi-apudan foton? Ĝi aperis en LJV aprilo 1965, p. 76, kaj montras la "Esperanto-pavilonon", konstruita de junaj volontuloj en la labororganizo "Muelejoj de Metilernantoj" en Francujo. Nun ĝi faris eĉ plian paŝon, enkondukante Esperanton eksperimente kiel pontlingvon por la junaj volontuloj. Ĝi organizas, kunlabore kun la NEJO-komisiono de TEJO, intensan Esp.-kurson de 17 ĝis 22 aŭg. 1966, celante ke la kursintoj uzu la lingvon en siaj interrilatoj dum la konstrulaboro, amuziĝo kaj kunrestado post la 22-a (ĝis maks. la 2-a de sept). Se tiuj datoj ne konvenas al vi, skribu tamen, por evt. trovi duan periodon. La eksperimento okazos en Muelejo ĉe Bonnat (Creuse); kotizo (ĉio inkl.): 7 Fr. tage. Laŭ la spertoj oni povos ĝeneraligi tiun metodon, tiel ke estonte en pluraj Muelejoj dum pluraj semajnoj intensaj Esp.-kursoj anticipu la konstrulaboron.

Por la sukcesigo ni petas la kunlaboron de:
la gazetaro: por varbi esp-istajn partoprenantojn, kaj por ĝenerala diskonigo.
la Landaj Sekcioj: por varbo de partoprenantoj ne-esp'istaj (kaj esp'istaj, precipe gitaristo, inoj pretaj kuiri, kapabluloj pretaj kunlabori en postaj jaroj). Ankaŭ: por akiro de subvencioj (ŝtataj, privataj, lernejaj, k.t.p.) por plifaciligi la partoprenon de malpli riĉaj gejunuloj.
Landaj Asocioj, instruistoj, aliaj helpantoj: por helpo en la supraj taskoj.

Pliaj informoj: Jean-Pierre Boulet, Grande Rue, **Châteaumeillant** (Cher), Fr.

STUDENTA SCIENCA RONDO DE ESPERANTISTOJ EN TORUN INFORMAS,

ke ĝi inter 14 kaj 16 aprilo 1966 organizas en Torun la Duan Internacian Esperanto-Seminarion.

La 1-a Seminario okazis en Torun, en jan. 1965, sub la Honora Protektado de la Prorektoro de la Universitato de Nikolao Kopernik. Partoprenis en ĝi 24 studentoj el Bulgarujo, Francujo, Orienta Germanujo kaj Hungarujo, kaj krome 50 el Pollando.

Celoj de la venontjara Seminario i.a. estas: resumo de la studenta agado dum la Jaro de Int. Kunlaboro, partopreno en la celebrado de la 1000-jara datreveno de la pola ŝtato, prezentado de la plej novaj disertacioj de studentoj-esp'istoj, prilaboro de agadmetodoj de studentaj sciencaj rondoj esp'istaj en la kadro de STELO.

En la Seminario povas partopreni ĉiu interesiĝanto. La kotizo estas 100 steloj por membroj de STELO, 125 steloj por nemembroj, sendenda al Francisko Simonnet, sekr.-kas. de STELO, 16 rue Dohis, **Vincennes** (Seine), Francujo. Pĉkk.: 18403-71 PARIS. La aliĝilon petu de, kaj sendu al la Rondo en Torun, str. Moniuszki 16/20.

La kotizo inkluzivas 4 tranoktojn, 12 manĝojn, kaj la programojn. Oni antaŭvidas ke partoprenos pli ol 150 gejunuloj.

FERVOJISTA JUNULARO VIGLE LABORAS EN FRANCUJO.

La 2-an de oktobro okazis la jarkunveno de la FFEA-Junularo en Parizo. En la nomo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio D-ro Imre Ferenczy (Hungarujo) salutis la partoprenantojn. La FFEA-Junularo pridiskutis la ĝisnunan agadon, prilaboris la novan laborplanon kaj elektis novan estraron. En la nova laborplano estas interalie kursoj, en- kaj eksterlandaj vojaĝoj. Estas menciinde, ke multaj gejunuloj deziras veturi venontjare al Hungarujo, por partopreni la TEJO – kaj UEA-Kongresojn. Kiel prezidanto estis elektita S-ino Josette BERNIER, la sekretario estas S-ino J. Vonay.

D-ro Imre Ferenczy.

NOVAĴOJ PRI LA 22-a I.J.K.

La Loka Kongresa Komitato de la 22-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO fervore laboras por perfekte antaŭprepari la Kongreson. Ĝis la 15-a de oktobro alvenis 35 aliĝiloj el Bulgarujo, Pollando kaj Hungarujo. LKK interkonsentis kun lokaj produktaj kaj komercaj instancoj, ke cigared- kaj alumetskatoloj, memoraĵoj, ktp., vendotaj dum la Kongreso, surhavos la emblemon de la IJK. Ankaŭ estas mendeblaj jam nun poŝtkartoj kun la emblemo bele surpresita, je 1 stelo por 5 ekz. (por mendoj malpli ol 65 ekz., aldonu sendkostojn).

Fondiĝis 15-membra Junulara Esperanto-Pantomimgrupo, kiu kontribuos al la programo de la Belarta Vespero. En la tuta departemento ekestis Esperanto-kursoj pro la jam sentebla spiro de la Kongreso. En Pécs mem lasttempe startis du oficialaj kursoj en lernejoj.



Kunsidas la LKK en Pécs

Unu el ili estas aranĝita de la lerneja komitato de KISZ (Komunista Junularo) kun 50 partoprenantoj.

KIEL RICEVI VIZON POR VIZITI HUNGARUJON

Jen kelkaj klarigoj por la partoprenontoj de la UK en Budapest kaj de aliaj aranĝoj en tiu lando.

Hungara vizo ne necesas por vizitantoj el Bulgarujo, Ĉeñoslovakujo, Jugoslavio, Pollando kaj Sovetunio. Vizitantoj el ĉiuj aliaj landoj devas peti vizon ĉe la hungara ambasado en sia lando. La vizo mem kostas $ 3,— aŭ egalvaloron. Ĝenerale ĝi validas por tri semajnoj.

Kondiĉo por ricevo de la vizo estas, ke oni antaŭpagu al la kontoj de la Universala Kongreso en Rotterdam (vidu sube) po 4 us. dolaroj aŭ egalvaloro por ĉiu tago inter la datoj 23 julio kaj 10 aŭgusto, dum kiu oni intencas resti en Hungarujo. Por ĉiu tago pasigota en Hungarujo ekster tiuj datoj oni antaŭpagu po 6,50 us. dolaroj aŭ egalvaloro. Tiel, ekzemple, por restado en Hungarujo nur dum la semajno de la U.K. (30 julio ĝis 6 aŭgusto) oni devas antaŭpagi 8 x 4 dolarojn.

Tiun antaŭpagitan monon UEA poste transpagos al Budapest. Ĝi restos je kredito de la koncerna persono. El tiu kredito li povos pagi loĝadon, ekskursojn kaj aliajn kongresajn servon (sed ne la kongres-kotizon). Se post tiuj mendoj de loĝado, ekskursoj ktp. ankoraŭ restos kredito, li ricevos tiun sumon en hungara mono en Budapest. Se, kontraŭe, la farita antaŭpago ne sufiĉos por tiuj mendoj, li devos ankoraŭ antaŭpagi al Rotterdam la mankantan sumon.

La antaŭpagita sumo ne estas repagebla. Ĝi estas uzebla nur por elspezoj en Budapest. Estas tre konsilinde antaŭpagi per UEA, ĉar normale la kondiĉoj estas pli severaj. Kompreneble, oni rajtas antaŭpagi pli ol la menciita minimuma sumo; en tiu okazo oni ricevos krediton en hungaraj forintoj en Budapest.

La antaŭpaga regulo ne validas por infanoj ĝis 16-jaraj, kiujn akompanas la gepatroj.

Iom da tempo post la antaŭpago al Rotterdam la paginto ricevos konfirman invitleteron el Hungarujo. Tiun leteron li devos transdoni aŭ sendi al la hugara ambasado en sia lando kune kun la formala peto pri vizo. Nur tiam la ambasado traktos la peton.

Ĉiuj detaloj pri loĝado, ekskursoj. ktp., aperos kiel kutime en la Dua Bulteno, kiun ricevos ĉiu aliĝinto al la UK.

La kongresaj kontoj, al kiuj oni pagu, estas: Poŝtĉekkonto 62 73 37 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto, aŭ la konto de la U.K. ĉe Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam. Sur ĉiuj pagiloj oni bonvolu nepre indiki sian nomon kaj aldoni "Kongreskredito Budapest".

UK 1967 DECIDITA: TEL AVIV

La Estraro de UEA jus voĉdonis favore al okazigo de Universala Kongreso en Tel Aviv, Israelo, el 1967.

Kiel al Japanujo, tiel ankaŭ al Israelo UEA organizos aviadilan karavanon. Personoj, kiuj principe interesiĝas pri aliĝo al tiu karavano, bonvolu jam anonci sin al la Centra Oficejo. Pri la prezo kaj aliaj detaloj aperos komuniko en posta eldono de "Esperanto". Ankaŭ ŝparkontoj ĉe UEA ekzistos same kiel por Tokio. Oni petu informojn.



Seriozaj diskutoj prepare al la 51-a Universala Kongreso: de maldekstre, s-ro Kisházi ödön, Vic-Prezidanto de la Hungara Respubliko; KKS Glauco Pompilio; d-ro Stefano Bácskai kaj s-ino B. Szerémi-Tóth, komitatanoj de UEA.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Komunikaĵo de la Prezidanto

Je la komenciĝo de la tria jaro de mia prezidanteco mi opinias utila doni al la publiko, responde al pluraj diverslokaj deziresprimoj, mallongajn informojn pri la nuna agado de la Akademio.

La unua jaro (1963-1964) estis dediĉita al la revizio de la Statuto, al la interna reorganizo kaj al provoj starigi en la akademianaro pli justan reprezentadon de la diversaj lingvofamilioj.

En la dua jaro (1964-1965) la Akademio esploris du ĉefajn demandojn, kiuj jam de longe atendis ian solvon, tiun pri la uzado de la pasivaj participoj kaj tiun pri la gramatika kategorieco de la radikoj; pri ambaŭ estis jam atingitaj decidoj: pri la unua demando, la plimulto de la Akademio konstatis, ke la ekzemploj entenataj en la "Fundamento" ne povas esti klarigataj laŭ la tiel nomata "nete tempa sistemo" sen arbitra perforto de ilia senco; pri la dua demando, la plimulto konstatis, ke la Esperantaj radikoj havas unu gramatikan karakteron kaj ke la analizo de De Saussure, kompletigita de Wüster kaj de Kalocsay, respondas al la realaĵoj de la lingvo.

La koncernaj Sekcioj (pri Gramatiko unuflanke, kaj pri la Komuna Vortaro aliflanke) nun prilaboras la tekston de la definitivaj rezolucioj pri tiuj du demandoj. La ceteraj Sekcioj, pri la Teknika Vortaro, la Bibliografio, la Prononcado kaj la Literaturo pretigas nun raportojn pri temoj poste esplorotaj de la Akademio.

Vitry, la 8-an de Novembro 1965
La Prezidanto, **G. Waringhien**

BELARTAJ KONKURSOJ 1965

Foto-konkurso: rezultoj kaj premioj

1-a premio: S-ro Tadeusz Kowalski el Varsovio, Pollando (100,- gld. plus fotoaparato).

2-a premio: S-ro Ito sotaro el Otu, Japanujo (70,- gld. plus projekciilo por lumbildoj).

3-a premio: S-ino Livie Vanžurová el Slatiňany, Čeĥoslovakio (40,- gld. plus projekciilo por lumbildoj).

4-a premio: S-ro Yatake tyôzo el Otu, Japanujo (projekciilo por lumbildoj).

La premiitaj fotoj aperos laŭeble en la revuoj de UEA.

LERNEJA KONFERENCO EN GRAZ

Aldone al la jam anoncitaj kvar raportoj (vidu decembro, p. 210) de prof. Lapenna kaj s-roj P. Zlatnar, R. Markarian kaj S. Zlatnar, la Konferenco diskutos jenajn ĝeneralajn raportojn, kiuj kompletigas la bazan programon:

e) La rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj. (E. Malmgren)
f) Esperanto kiel ebla instrulingvo por iuj afrikaj kaj aziaj landoj. (V. Sadler)
g) La aŭdo-parola metodo de lingvoinstruado kaj ĝia apliko al Esperanto. (Duncan Charters)
h) Aspektoj de Esperanta fonetiko. (J. C. Wells kaj Eleanor M. Higginbottom).

La LKK en Graz informas, ke la unua kotizaltigo okazos ne la 31-an de decembro, sed la *31-an de januaro 1966*. Do ĝis la 31-a de januaro oni pagas nur 100,— aŭstrajn ŝilingojn. Sendu per banko al: Steiermärkische Sparkasse, Graz, Schmidgasse, por Konto 5431 (Esperanto-Konferenco). Aliĝilojn liveras LKK. Adreso: Esperanto-Konferenco, 8046 Graz, Aŭstrujo.

DELEGITOJ

Belgujo

Dave (Namur). FD (Biologio): S-ro Robert Hellebaut, psiĥiatria flegisto, Clinique "Sanitas", 4 rue Saint Hubert; tel. (081) 30961.

Brazilo

Sorocaba (São Paulo) 139 000
D: S-ro Manoel Blaz Garcia, kontor-oficisto, Rua Martins de Oliveira 432.

Britujo

Dagenham D & FD: vakas.

Bulgarujo

Plovdiv D: vakas.

Čeĥoslovakio

Bratislava D: vakas.
Kroměříž (Morava) 22 000
D: S-ro Stanislav Čáp, ekonomo de sukerfabriko, Husovo nám. 230/15.
FD (Turismo): la D.
Orlová III (Slezsko) 25 000
D: S-ro Josef Stankuŝ, minist-pensiulo, Orlová III 562, Okr. Karviná; tel. 2015.
FD (Esperanto-instruado): la D.
Partizánska Lupča D & FD: vakas.
Vojkov u Říčan (Čechy) 10 000
D: S-ro Jan Sedláček, em. metalfabrikestro, Vojkov 45 p. Říčany u Prahy.

Finnlando

Helsinki JD: vakas.
Lahti D: S-ro Aleksi Huoponen, librotenisto, Okeroistentie 37.
Turku FD (Turismo): S-ro Vaito Vihjanen, ŝtatoficisto, Hansakatu. 1. D32; tel. 921-331652.

Francujo

Boulogne-Billancourt FD (Elektroniko): vakas.
03 **Bourbon-l'Archambault** (Allier) 3 000
D: S-ro Jean Gourtner, poŝtisto, "La Ste. Chapelle"; tel. 1.69.
88 **Bruyères** (Vosges) 3 800
FD (Instruado): S-ro Jean-Louis Claudel, profesoro pri fiziko, liceo de Bruyères.
Paris FD (Turismo): S-ino Julieta Fayot, pentristino, 11 place des Vosges, Paris 4e.
95 **Sarcelles-Lochères** (Val d'Oise)
FD (Elektroniko): S-ro Maurice Feneyrol, elektronikisto, 15 allée Eric Satie.

Germanujo

4006 **Erkrath-Unterbach** (Nordrhein-Westfalen) 15 000
FD (Varbado): S-ro Knut-Albrecht Kaeser, varbfaka oficisto, Lindenstr. 11; tel. (oficejo) 330141.

Hamburg FD (Astronomio): vakas

Mannheim D: S-ro Johannes Radam, ligna-ĵisto, Osteroder Weg 4, 6800 Mannheim-Schönau.
VD: vakas.

München D: S-ro Horst Spirat, maŝinkonstru-isto, Attenkoferstr. 55, 8 München-25; tel. 77 64 05.

Regensburg D: S-ino Margareta Kammerer, fervoj-oficistino, Blumenstr. 8.

St. Martin D: la JD.

Italujo

Milano FD (Turismo): S-ro Angelo Lovati, bankoficisto, Milano 17/38, Via Lipari 8; tel. 460933.

Japanujo

Sizuoka (Sizuoka-ken) 450 000
D: S-ro Rokuro Tokuda, eks-radiokomen-tariisto, No. 11, 1 ĉome, Mizuoĉi; tel. 52-3023.

Jugoslavio

Šentilj v. Sl. g. FD (Turismo): la D.

Nederlando

Leiden FD (Universitataj aferoj): vakas.

Norvegujo

Skudeneshavn D: vakas.

Nov-Zelando

Wellington FD (Plastaĵoj): vakas.

Pollando

Piekary Śląskie (Silezio) 30 000
D: pastro Henriko Paruzel, (Katowice), sk. pt. 71.

Sosnowiec FD (Turismo): S-ino Helena Gra-bowska, profesorino, Str. Cedlera 2-35; tel. 634-45.

Sudafriko

Pretoria FD (Instruado): S-ro John L. Macken-zie, instruisto, 6 Maynew Road, Valhalla; tel. 71-3047.

Svedujo

Alingsås FD (Komerco: Radio kaj TV): S-ro Arne A. E. Andersson, komercisto, Källelid, Vadsjön; tel. 14427/13295.

Svislando

Genève FD (Industrio: gaso): S-ro Emile Cur-tenaz, emerito, Pension Berney, rue de l' Ecole-de-Médecine 2, 1205 Genève; tel. (022) 25.15.30

2068 **Hauterive** (Neuchâtel) 1 700
D: D-ro August Braun, fizikisto-metalograf-isto, chemin des Jardillets 29; tel. (038) 3 28 43.
FD (Astronomio): la D.
FD (Filozofio: Krišnamurti): la D.
FD (Fiziko: metalfiziko): la D.

4500 **Solothurn** (Kt. Solothurn) 20 000
FD (Turismo): S-ino Doris Schmid, instru-istino, Obachstr. 1; tel. (065) 2 93 21.

Vevey FD (Ruĝa Kruco): D-ro Jean-Jaques Jaton, kuracisto, 35, rue du Simplon; tel. (021) 51.22.24.

Usono

Palo Alto D: S-ino Ella Gibson, sekretariino, 912 Forest Avenue; tel. 321-6344.
FD (Edukado): vakas.

NOVA DUMVIVA PATRONO DE UEA

S-ro Per Edler, Härnösand, Svedujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Baumslag, s-ro Kalman, Johannesburg, Sud-afriko.
Carlué, s-ro Maurice, Aix-en-Provence, Fr.
Louys, f-ino J., Pierrefontaine-les-Blamont, Fr.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

4 Tulby, s-ro V.I., Aŭstralio. 5 Zielinski, s-ro Zb., Aŭstrujo. 6 Geers, f-ino Blanche, Belgujo. 7 Andresen, s-ino Hilkka-Liisa; 8 Andresen, s-ro Søren, Danlando. 9 Bernard, s-ro Roger; 10Curnelle, s-ro René; 11 Larglantier, s-ro Georges, Francujo. 12 Jerković, inĝ. B., Jugo-slavio. 13 Clark, d-ro K. A.; 14 Clark, f-ino Mary A.; 15 Henderson, s-ino Dorothy M.; 16 Henderson, s-ro Douglas C.; 17 Lewis, s-ro H. J.; 18 Maier-Bevel, s-ino A. L., Kanado. 19 Dijk, s-ro J. P. van, Nederlando; 20 Cins, s-ro Solomon Iljiĉ, Sovetunio. 21 Beckford, s-ro C.S., Sudafriko.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Germanujo: Gieseler, s-ro W., 4,20. Neder-lando: Wensing, s-ro E. L. M., 2,95. Svislando, Cool, s-ro G. F. T., 10,—.

Sumo entute ricevita:	21 486 39 gld.
Sumo elspezita:	18 020,74 gld.
Saldo pozitiva:	3 465,65 gld.

FONDAJO CANUTO

Kanado: Moisley, s-ino M. C., 3 MA, 1 J-MA. Nederlando: Wekker, f-ino E., 1 MA. Svislando: Cool, s-ro G. F. T., 1 MJ. Usono: Murray, s-ino Mary, 1 MA, 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezi-dinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. Ekde tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1965

(Vidu "Esperanto" majo p. 94)

A. (16,— gld.): 33. Rosenträger, s-ro H., Ger-manujo.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1966

A. (16,— gld.): 1. Pauels, s-ro W., Germanujo.

FONDAJO JUNULARA GAZETO (Gld.)

Francujo: Oehri, s-ino J., 7,—. Nederlando: Maasbommel, f-ino E. M., 10,—.

DONACOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Francujo: Vazon, f-ino B., 17,55. Nederlando: Kampherbeek, f-ino I., 10,—. Usono: Fineberg, s-ro Allan E., 3,60.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1965, 1-a parto, p. 190-191. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 49.96 m. (6005 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.45m. (9540 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 40.82m. (7350 kcs), 24.88m. (12055 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 25.12m. (11945 kcs), 19.89m. (15080 kcs). I.
	16.35-16.50	Roma, 41.24m. (7275 kcs), 31.33m. (9575 kcs). P. Radio Roma, Esperanto fako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.05-20.30	Sofia, 48.04m. (6245 kcs), 25.61m. (11715 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210m. (1430 kcs), 88.63m. (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	23.30-23.55	Sofia, 49.42m. (6070 kcs), 41.35m. (7255 kcs.). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216m. (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	12.00-12.10	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 19.60m. (15305 kcs), 13.94m. (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
	18.00-18.30	Budapest, 240m. (1250 kcs), 48.10m. (6234 kcs). I. Radio Budapest, Dissendoj por Aŭstrujo, Brody S.u. 5/7, Budapest VIII, Hungarujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
	22.45-23.00	Valencia, 278m. (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Mardo	14.45-15.00	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo.
	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs), 514m. (584 kcs), 293m. (1025 kcs), 25.45m. (11785 kcs), 16.78m. (17880 kcs). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Merkredo	6.20- 6.35	Gdańsk, 230m. (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	12.00-12.10	Bern, Kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11950 kcs), 16.78m. (17880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	18.45-19.00	Resende, 196m. (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.30-23.55	Bilbao, 264m. (1133 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	8.30- 8.40	Wellington, 49.34m. (6080 kcs), 31.45m. (9540 kcs). I. Radio New Zealand, P.O. Box 2396, Wellington C.1, Nov-Zelando. (nur la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato).
	11.30-11.40	Wellington. Ripeto de la programo.
	17.50-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (ĉiun alternan jaŭdon).
	21.15-21.25	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 25.61m. (11715 kcs). P. (D-ro Baur).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1133 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	20.00-20.30	Pekino, 47.85m. (6270 kcs), 45.70m. (6560 kcs), 40.42m. (7440 kcs), 39.37m. (7620 kcs), 32.12m. (9340 kcs), 30.14m. (9955 kcs). I.
	22.45-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs), 31.53m. (9515 kcs). K. Radio Roquete Pinto, Rio de Janeiro, Brazilo.
	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	11.30-12.00	Niteroi, 240m. (1250 kcs), I.K. Radiodifusora Fluminense, Niteroi (Rio de Janeiro), Brazilo.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	16.00-16.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs). I.K. La Voz de Guatemala Guatemala Cd., Mezameriko.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaude (S-ro C. Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191m. (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

RADIO ROMA. 5-XII, La granda itala helenisto Manara Valgimigli; 12-XII, Italaj regionoj: Kalabrio; 19-XII, Italaj pentristoj: Caravaggio; 26-XII, Leterkesto. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".
Redaktoro: Luigi Minnaja, kiu estos al vi danka se de tempo al tempo vi informos la Esperanto-fakon de Radio Roma pri via aŭskultado kaj pri la Esperanto-movado en via urbo.

Viena anekdoto: Iam skribis radio-amatoro esperantista al Vieno kaj demandis, ĉu estas samideano en Vieno, kiu havas intereson pri la speciala fako "Esperanto en la etero" ? ? ? Jen la respondo: Ni ne havas Esperantiston por la etero, ni bezonas ilin sur la tero. Tamen fariĝu Radio-amatoro esperantista. Esperanto en la etero estas potenco ! Bv. skribi al OE 3 RU, A. 3812 Gr. Siegharts/Aŭstrujo.

Interŝanĝas poŝtkartojn pri folkloraj kostumoj, tutmonde. S-ro Francisco Parareda, Illadigna, 5-4°-1a, Sabadell (Barcelona), Hispanujo.

La 50-a (Jubilea) Brita Kongreso de Esperanto, la 27a ĝis la 30a de majo 1966, okazos en la bela angla urbo Norwich. La kongreso estos vere vizitinda por alilandanoj, kiuj kompreneble estos aparte bonvenigataj (kaj la kongreskotizon ili ne pagas !) Bonvolu skribi tuj al: S-ino E. Watson, 5 Rolleston Close, Norwich, NOR 60 H, Anglujo.

15 studantinoj de gimnazio — komencantinoj en Esperanto — 16-jaraj, deziras korespondi bildkarte kĉl., adreso: Jar. Kuzník, Opava, Strossmayerova 9, Ĉeĥoslovakio. Skribu multnombre.

Esperanto-societo Skopje renovigas sian bibliotekon pereintan dum la tertremo en julio 1963. Ni petas: helpu ankaŭ vi sendante almenaŭ unu libron kiun vi ne plu aŭ ne tro bezonas. Anticipan dankon ! Adreso: Esperanto-societo "La Progreso", Ul. Vapcarov 17, Skopje, Jugoslavio.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1965

Stato je la 30-a de novembro

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2365	2645	111,84
2. Belgujo	1770	1960	110,73
3. Usono	3827	4062	106,14
4. Japanujo	3745	3935	105,07
5. Svislando	1800	1860	103,33
6. Francujo	7009	7237	103,25
7. Hispanujo	2804	2860	102,—
8. Danlando	2704	2732	101,04
9. Germanujo	6551	6590	100,60
10. Nederlando	5140	5156	100,31
11. Svedujo	6190	6080	98,22
12. Britujo	6053	5818	96,12
13. Brazilo	3411	3240	94,99
14. Italujo	3932	3650	92,83
15. Norvegujo	1490	1300	87,25
16. Jugoslavio	3295	1875	56,90

Konkurso II

1. Aŭstrujo	1090	1270	116,51
2. Kanado	702	769	109,54
3. Aŭstralio	1288	1318	102,33
4. Sudafriko	250	245	98,—
5. Nov-Zelando	1195	1166	97,57
6. Argentino	760	725	95,39
7. Israelo	405	360	88,89
8. Islando	250	215	86,—
9. Madagaskaro	250	120	48,—
10. Portugalujo	380	120	31,58
11. Urugvajo	250	65	26,—

(Vidu la regularon en "Esperanto" 1965 p. 38.)

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Deziras interŝanĝi p.m. kun ĉiuj landoj. Kvanton kontraŭ kvanto. Respondo garantiata. Skribu al M. J. E. Kat, Montfoortlaan 13 III, Utrecht, Nederlando.

Mi invitas lertajn, viglajn gesamideanojn partopreni turistvojaĝon Suditalujon, dektaga marrestado, venontan majon, multinteresa, malmultekosta. Junion mi vojaĝos Finnlandon muzikpreleganto, mi deziras interrilati esperantgrupojn. Lovati, Lipari 8, Milano, Italujo.

Tridek lernantinoj (10-j) volonte ricevus pk. kaj interesaĵojn el la mondo. Nepra respondo. S-ino Ligot, école Plaine de Mons, 59 Valenciennes (Francujo).

Deziras korespondi Aulikki Mättö, Porvoonk. 5 A 24, Helsinki, Finnlando.

S-ro J. Dony, 46 rue de la Libération, 42 - La Ricamarie (Francujo) deziras korespondi kun gesamideanoj, kiuj instruas Esperanton el ĉiuj landoj.

Letervespero organizota dum marto 1966. Skribu multnombre. S-ro Reboux, 41 Grande Rue, 91-Epinay sur Orge (Francujo).

La scienco pruvis, ke grandskale ekzistas sistemo kaj plano en la vivo. Ĉu do povas esti, ke **ĉio** en la vivo funkcias laŭ certa sistemo ? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F, Danlando.

Esperantlingvaj urboprospekto, unutagkoverto kun E-stampita poŝtmarko kaj 36 glumarkoj kostas nur 6 respondkuponojn. Esperanto-Societo Düsseldorf, 4005 Büderich, Neusser Str. 33, Germanujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

S-ro Ulrich Lins (5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo) estas komisiita de Germana Esperanto-Junularo kompili dokumentaron pri la situacio de la germana Esperanto-movado dum la Tria Regno (1933-45). Tiucele li bezonas informojn kaj gazetraportojn, kiuj koncernas Esperanton dum la Hitlera regado, ordonojn pri arestado, oficialajn tekstojn pri malpermesoj okupiĝi pri la Internacia Lingvo kaj sciigojn pri germanoj kaj eksterlandanoj, kiuj interrilatis per Esperanto dum la nazia periodo kaj ĉefe dum la milito. Ankaŭ informoj pri la situacio en la okupitaj landoj estas bonvenaj.

Atentu ! ! ! TEJO-anoj, bonvolus fondi radioamatoran grupon. Neniu UEA-Kongreso sen propra TEJO-radioamatora stacio. "Esperanto en la etero" estas potenco. Informojn donu via poŝtejo, aŭ rekte skribu al d-ro Anton Huemer, OE 5 HML radioamatora stacio A4360 Grein/Aŭstrujo.

Jam de 1965 aperas en granda formato. Abonu nun!

KOMPLETAJ JARKOLEKTOJ

REVUO ESPERANTO 1965 tolbindita volumo, ora surpreso, 224 + 48 paĝoj, konservindaj artikoloj.
Por MA 1965: 7,– gld.; por aliaj: 14,– gld.

LA PRAKTIKO 1965: 7,50 gld. nebindita jarkolekto, 176 grandaj paĝoj, multaj ilustraĵoj.

Speciala oferto: jarkolekto 1964: 5,– gld.

Rapidu! Ambaŭ kvantoj estas limigitaj!

APERIS NOVA ELDONO

de la 6-lingva (angla, franca, germana, hispana, japana, rusa) 10-paĝa faldfolio por informado en universitataj medioj.

Trafa, serioza enhavo.

Subskriboj de 75 profesoroj en 27 landoj.

Prezo: po 0,07 gld.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA. Utiligu dum la subskribo-kolektado en la universitatoj!

LINGVOLOGIA REVUO

Esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio, la kalkuleca lingvoscienco. La unua numero aperinta. Aperos dufoje en jaro. Estos senpage sendata de la eldonanto kaj redaktoro Emil Hanhiniemi, P. O. Box 764, Ingham, N. Queensland, Aŭstralio.

ĈU VI JAM PAGIS LA KOTIZON DE 1966?

Por eviti ĉiujn zorgojn pri kotizpagado, petu vian bankon aŭ poŝtĉekoficejon ĉiujare transpagi por vi aŭtomate je difinita dato. Akurata kotizado ŝparigas monon al UEA!

EL LA VIVO DE LUDOVIKO ZAMENHOF

de Gösta Henriksson

Legolibreto por novaj esperantistoj pri la junaĝaj jaroj de Zamenhof. La konciza prezentado kaj simpla lingvo donos eblecon trastudi la libreton dum parto de studsezono kaj doni al la lernantoj la personan fonon de la ekesto de la lingvo Esperanto..
Prezo: gld. 2,—

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo. **ELDONA SOCIETO ESPERANTO**

Ĵus aperis

H. C. ANDERSEN

"FABELOJ"

(1-a volumo)

Traduko de D-ro L. L. Zamenhof
53 originalaj ilustraĵoj de A. Uniechowski

238-paĝa eleganta eldono kun trikolora ŝirmkovrilo. Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon validan por aĉeto de la eldonota 2-a volumo.

Sendante al sia libroservo la rabatkuponon entenitan en la 4-a volumo de "Fabeloj" oni ricevos rabaton de 0,30 us. $.

Prezo: 3 us. $ (+ 10% por sendokostoj)

Liveras la naciaj libro-servoj kaj la Libro-Servo de UEA
Eldonis: "Heroldo de Esperanto", 13 rue de la Reinette-Pippelingstr., Bruselo 1

ESPERANTO:
A NEW APPROACH

★

William Auld, M.A., D.B.E.A.

Member of the Esperanto Academy
Principal Teacher of English at Grange School, Alloa

ELDONIS : HEROLDO

La plej moderna lernolibro de Esperanto por angle parolantoj !

14 lecionoj kun ŝlosilo por memlernantoj.
Literaturaj legaĵoj el la plumo de la plej famaj Esperanto-verkistoj.
Vortareto Esperanto-angla.

Prezo: 1,20 $ (8/7 ŝil.)

Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon en valoro de 0,30 $ validan por aĉeto de "Fabeloj" de H. C. Andersen, vol. IV (trad. D-ro L. L. Zamenhof).

W. AULD instruas Esperanton laŭ *nova didaktika metodo*, nome laŭ la ecoj de la internacia lingvo mem kaj ne laŭ la strukturo de la angla lingvo. Aĉetu ĉe via Libro-Servo aŭ ĉe U.E.A.

NOVA ELDONO EN LA FAMA SERIO ORIENTO-OKCIDENTO (N-RO 6)

REĜO LEAR

Bind.
16,50 gld.

Broŝ.
14,— gld.

160
paĝoj

21 x
15 cm.

Unu el la plej grandaj kaj emociaj dramoj de William Shakespeare, REĜO LEAR nun aperis en la definitiva traduko de

K. KALOCSAY,

memore al la 350-jara datreveno de la morto de la aŭtoro. Brilkvalita teksto, bela preso kaj bindo, formato de "Naŭzo", "Kalevala" ktp.

Eldono de Universala Esperanto-Asocio

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Miĥail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio de Lermontovaj verkoj en Esperanto

Moderna plasta kovrilo

Prezo: 5,– gld.
(20 steloj)

Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiĝanta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski

368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".

Prezoj:

kun leda dorso 35,— gld (140 st)
tuttole bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

Ĉu vi serĉas revuon

kiu enhavas interesajn artikolojn pri
popularaj temoj,
kun grandformataj trafaj ilustraĵoj,
kiu vere "instruas kaj amuzas"?

Do vi bezonas la monatan bildrevuon

LA PRAKTIKO

La administra maŝino de Universala Esperanto-Asocio kaj la redaktado de s-ino E. Burgler-Jezsó garantias regulan, akuratan aperadon kaj aktualan enhavon.

Jarabono 1966: 10,— gld. (40 steloj). Kotizu per via kutima peranto, aŭ rekte al UEA.